

UNESKO Kuriero

ISSN 2521-7356

oktobro-decembro 2019

Kiam instruisto estas alvokiĝo

Kanado

Duaŝanca lernejo

Ĉilio

Instrui malantaŭ la kradoj

Ĉinio

Instruisto alportas esperon al
fora vilaĝo

Kongo


Instrui en klaso kun 76
lernantoj

Barato

La lernejo sub ponto

Sieraleono

Mohamed Sidibay:
historio de eksa
infana soldato



Organizaĵo de
Unuiĝintaj Nacioj por
Edukado, Scienco kaj Kulturo

Legu la Unesko- Kurieron disvastigu la vorton

Abonu la bitversion



Ĝi estas 100%
SEN PAGA!

<http://kuriero.esperas.info>
http://uea.org/revuoj/unesko_kuriero



Publikigata en 10 lingvoj

Angla, araba, ĉina, Esperanto, franca,
hispana, korea, portugala, rusa kaj sicilia.

Fariĝu aktiva eldona partnero proponante novajn lingvajn
eldonojn de *Unesko-Kuriero*.



Estu grava aganto!

Disvastigu *Unesko-*

Kurieron tra via reto antaŭenigante ĝin,
konforme al la reguloj de Unesko pri
Libera aliro [Open Access] al publikigaĵoj.



Abonu la paperajn versiojn UN-lingvajn

▪ 1 jaro (4 numeroj): €27 ▪ 2 jaroj (8 numeroj): €54

La Esperanto-versio aboneblas ĉe la redakcio je €50
jare, UEA-konto: kurier.

UN-lingvaj abonkotoj pagas la kostojn por
presado kaj distribuado. Rabatoj por grupaj
abonoj: 10% por kvin aŭ pli da abonoj. Por pliaj UN-

lingvaj informoj, vizitu:

<http://publishing.unesco.org>
aŭ kontaktu:

DL Services, c/o Michot Warehouses,
Chaussée de Mons 77,
BE-1600 Sint Pieters Leeuw, Belgio
Tel: (+ 32) 477 455 329
E-poŝto: jean.de.lannoy@dl-servi.com

2019 [okt-dec] • n-ro 4 • Eldonata ekde 1948

Unesko-Kuriero estas eldonata danke al la grandanima apogo de Ĉina Popola Respubliko kvarfoje jare de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Klerigado [Edukado], Scienco kaj Kulturo (Unesko). Ĝi antaŭenigas la idealojn de Unesko, diskonigante ideojn pri inter nacie gravaj temoj, konforme al sia mandato.

Direktoro: Vincent Defourny

Ĉefredaktoro intertempa: Agnès Bardon

Asista redaktoro: Katerina Markelova

Sekcia redaktoro: Chen Xiaorong

Tradukoj kaj enpaŝiga kunordigado: Veronika Fedorchenko

Tradukado: Esperanto-Teamo de *Unesko-Kuriero*

Redaktoroj pri lingvoj:

Angla: Shiraz Sidhva

Araba: Anissa Barrak

Ĉina: Sun Min k Ĉina Tradukejo k Eldonejo

Franca: Gabriel Casajus, reviziante

ispana: William Navarrete

Rusa: Marina Yartseva

Cifereca redaktoro: Mila Ibrahimova

Fotoj kaj ilustraĵoj: Danica Bijeljac

Administracia kaj redakcia asistanto:

Carolina Rollán Ortega

Produktado kaj antaŭenigo:

Ian Denison, Estro pri publikigado kaj varmarkada antaŭenigo de Unesko
Eric Frogé, Ĉefa asistanto produktada

Cifereca redaktoro:

Denis Pitzalis, Reteja arĥitekto/projektanto

Amaskomunikilaraj Rilatoj:

Laëtitia Kaci, gazetarsekretario

Fasonado: Corinne Hayworth

Kovrila bildo: © Osama Hajjaj

Internuloj: Gao Sijia, Ren Danni, Xu Dan (Ĉinujo), Alice Christophe, Coralie Moreau (Francujo) Natasha D'souza (Barato)

Kuneldonaj redaktoroj:

Esperanto: Andrej Peĉenkin (Ruslando)

Korea: Eun Young Cho

Portugala: Ana Lúcia Guimaraes

Sicilia: David Paleino

La bitversio haveblas senpage ĉe

https://uea.org/revuoj/unesko_kuriero

Eldono: Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Redaktoro: Andrej Peĉenkin *andrej*.

pechonkin@gmail.com

Vicredaktoro k Kunordiganto el UEA:

Trezoro Huang Yinbao, trezoro@qq.com

Lingvaj reviziantoj: Anna Bennett (US), Michela Lipari (IT), Rob Moerbeek (NL), Mike Leon (NZ).

Malgarantio: Unesko ne garantias la konformon de la Esperanto-eldonaĵo al la originala numero en la ses oficialaj lingvoj de la Organizaĵo.

Informo kaj Kopirajtoj:

courier@unesco.org

7 place de Fontenoy, 75352 Paris 07 SP, Francujo.

© Unesko 2019

ISSN 2521-7356 (papera) • ISSN 2521-7364 (reta)



Periodaĵo, alirebla en Open Access (Libera Aliro) sub la licenco "Attribution ShareAlike 3.0 IGO (CC BY SA 3.0 IGO) (<http://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/igo/>)". Uzante la enhavon de ĉi tiu eldonajo, la uzantoj devas observi la priuzajn kondiĉojn de Unesko Open Access Repository (Unesko-Deponejo de Libera Aliro) (<http://en.unesco.org/open-access/>).

La supra licenco koncernas ekskluzive la tekstojn. Por uzi la bildojn, oni devas peti permeson.

La indikoj, uzitaj en tiu ĉi eldonajo, kaj la prezento de la donitajoj ne implicas esprimon de ia ajn opinio deflanke de ia ajn lando de Unesko koncerne la leĝan staton de ia ajn lando, teritorio, urbo aŭ sfero de ties regado aŭ koncerne markadon de landlimoj.

La artikoloj esprimas la opiniojn de la aŭtoroj, ne nepre reprezentas la opiniojn de Unesko, kiu ne respondecas pri ili.

Redakcie

Ĉi tiu sekcio LARĜANGULE estas publikigata por marki la Mondan Tagon de Instruisto, celebratan la 5-an de oktobro ĉiujare.

“Malebla profesio”. Laŭ Sigmund Freud [i:kmont'fʁɔxt], klerigado, samkiel regado kaj psikoanalizo, reprezentas entreprenon, “en kiu oni povas anticipe certi atingi nekontentigajn rezultojn”¹. Ne estas facila tasko samtempe transdoni scion, teni klasĉambran disciplinon, instigi scivolon, komuniki la regulojn pri kunvivado kaj trejni estontajn civitanojn.

La defio estas eĉ pli malfacile akceptebla en kuntekstoj, kiuj estas markitaj, tro ofte, per manko de rimedoj, plenplenaj klasĉambroj aŭ eĉ la risko, ke la origina celo de la instruisto perdas sian sencon.

Certe, ĉiu rekonas la ŝlosilan rolon de instruistoj. Je persona nivelo, ni ĉiuj povas nomi almenaŭ unu instruiston, kiu grave influis nin — kelkfoje tiel efike, ke tio redirektis nian tutan vivon. Je internacia nivelo, la Celoj por Daŭripova Evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj (CDE) [United Nations Sustainable Development Goals, (SDGs)], precipe la Kvara Celu, rekonas la gravecon de instruistoj por plenumi la Celaron por Daŭripova Evoluigo ĝis 2030.

Tamen, la profesio estas senkreditigata. La evoluo de kognaj neŭrosciencoj kaj la multaj aplikoj de novaj teknologioj en la kampo de klerigado devigas la profesion adapti kaj reinventi sin.

Iam respektata kaj valorigata, la rolo de instruisto nuntempe estas kontestata, kaj instruistoj estas devigataj surprizi

la respondecon pri la malsukcesoj de la klerigado-sistemo. Ĉi tiu negativa percepto pri ili — kelkfoje — rezultigas timigadon, aŭ eĉ perforton, fare de lernantoj aŭ iliaj familioj.

Fakte, estas tre malfacile por la profesio allogi novajn varbitojn. Post kelkaj jaroj de laboro, multaj instruistoj rezignas. Studo el 2014 farita en Usono pri 50 000 instruistoj² montris, ke pli ol 41% el ili (bazaj kaj mezaj lernejoj kune) rezignas la profesion post kvin jaroj.

Malgrandaj enspezoj, limigita profesia promocio, fortaj sociaj premoj kaj manko de rimedoj, ĉiuj ĉi estas faktoroj, kiuj malkuraĝigas gejunulojn entrepreni ĉi tiun karieron.

Krome, pli ol 69 milionoj da instruistoj varbendas ĝis 2030 por plenumi la CDE-ojn [SDGs]. Inter tiuj, 48,6 milionoj da

novaj varbotoj necesos por anstataŭi la rezignontajn instruistojn. Jam estas grava manko de instruistoj en Okcidenta Azio kaj Subsahara Afriko.

En tiu kunteksto, kiel ni povas varbi novan generacion de entuziasmaj instruistoj? Tiu ĉi demando inspiris la temon de la okazigo en 2019 de la Monda Instruista Tago, la 5-an de oktobro: Junaj Instruistoj: La Estonteco de la Profesio.

Sed ekster la alarmaj nombroj, statistikoj kaj kaplinioj, ankoraŭ estas instruistoj ne malkuraĝigitaj de la malfacila situacio. Instruistoj, kiuj daŭre instruas en la plej malriĉaj lokoj kaj en plenplenaj klasĉambroj. Instruistoj, kiuj decidas labori kun lernantoj kun malfacilaj travivaĵoj, tiuj, kiuj estas ekster la lerneja sistemo aŭ loĝas en foraj regionoj. Instruistoj, por kiuj instrui estas sindevontigo kaj ĉiutaga klopodo. Estas tiuj instruistoj, kiujn la Kuriero honoras hodiaŭ.

Vincent Defourny and Agnès Bardon

El la angla lingvo tradukis **Rafael Lima**
(Brazilo)

Sandrine instruas en lernejo en Burkino Faso, spite al tio, ke la lernejo havas nek akvon nek elektron. Foto de la filmado de la dokumenta filmo, Teach Me If You Can [Instruu min, se vi povas][aŭ Instruistoj de la malebla], produktita de franca filmkompanio Winds partnerece kun Unesko.



© Winds/É. Théron

1. Freud, S., 1937. *Analysis Terminable and Interminable*.

2. Ingersoll, R., Merrill, E., Stuckey, D. kaj Collins G., 2014, ĝisdatigita en oktobro 2018. *Seven Trends: The Transformation of the Teaching Force*. Consortium for Policy Research in Education (CPRE) Research Reports [Sep tendencoj: La transformado de la instruistaj fortoj. Esploraj raportoj de la Konsorcio por la esploro de klerigaj politikoj (CPRE)].

Enhavo



LARĜANGULE

7

**Duaŝanca lernejo
en Montrealo**
Lyne Fréche

10

**La lernejo sub ponto
en New Delhi**
Sébastien Farcis

12

**Mohamed SIDIBAY:
la rolo de instruistoj estas
redoni al ni nian fidon**
Intervjuo de Agnès Bardon

14

**Kongo: instrui en klaso
kun 76 lernantoj**
Laudes Martial Mbon

15

**Instruistoj de la maleblo:
de la klasĉambro al la granda ekrano**

16


**Instrui malantaŭ la kradoj
en Valparaíso**
Carolina Jerez Henríquez

18

**Instruisto alportas esperon
al fora ĉina vilaĝo**
Wang Shuo



6-19



20-27

ZOMO



**Arĥiva trezoro: La nepublikita
albumo de David Seymour**

La historio de la malkovro de forgesita
albumo de la kunfondinto de la
agentejo *Magnum* en la Unesko-arkivoj

Fotoj: David SEYMOUR/*Magnum Photos*
Tekstoj: Giovanna Hendel, Unesko




28-33

IDEOJ 

29

Arkitekturaj lecionoj por la estonteco, pere de la estinteco
Amin Al-Habaibeh



34-37

NIA GASTO



Nelly MINVERSKY: la verda reĝino
Intervjuo de Lucía Iglesias Kuntz



AKTUALAĴOJ

39

Inkaa pendanta ponto restaŭrita en Peruo
Jordi Busqué

42

El la holdoj de Clotilda al Africatown
Sylviane A. Diouf

38-45





Kiam instruisto estas alvokiĝo

Larĝangule

Kénia Alvarado-Lara, instruistino ĉe la Centre d'intégration scolaire [Centro de kleriga integrado] en Montrealo (la sola tiaspeca institucio en Kanado por infanoj kun lernaj kaj psiĥologiaj problemoj), konsolas lernanton dum ekzameno. Multaj el la infanoj ĉi tie suferas psikologiajn kaj konduktajn problemojn kaj ne kapablas lerni ĉe ordinaraj lernejoj.

© Robert Etcheverry

Duaŝanca lernejo *en Montrealo*

Lyne Fréchet, kanada ĵurnalisto

Sukcesi en tio, pri kio fiaskis la tradicia lernejo. Tio estas la defio, kiun devas ĉiutage alfronti la instruistoj de la Centro por Lerneja Integrado [Centre d'intégration scolaire] (CIS) de Montrealo, kiu akceptas problemajn lernantojn. Ekhavi ilian konfidon estas antaŭpostulo en ĉia lernado.

Kun siaj brikaĵoj muroj, siaj desegnaĵoj algluitaj al la muroj kaj siaj eluzitaj ŝrankoj, la Centro por Lerneja Integrado similas al ajna lernejo. La lernoĉambro malfermiĝas al vico da skribotabloj antaŭ nigra tabulo. Kaj ekde la oka horo matene, gelernantoj brue invadas la grandan ŝtuparon, kiu kondukas al la etaĝoj. Sed la komparo ĉesas en tio.

Ĉar tiu institucio situanta en la kvartalo Rosemont akceptas ekde antaŭ kvindek jaroj senprotektajn gelernantojn, spertantajn lernomalfacilaĵojn aŭ kun psikaj problemoj. Kelkaj havas malantaŭ si ĥaosajn vojojn, komplikajn familiajn historiojn, foje kun problemoj kun la leĝo. Aĝaj inter 6 kaj 18 jarojn, ili ĝenerale ankaŭ havas pezan pasinton en la lernejo. Ili konis la lernejan malsukceson, sinsekvajn forpelojn aŭ forigon en la malantaŭon de la ĉambro kun sia propra programo por lernantoj kun malfacilaĵoj. La Centro por Integrado konsistigas por ili novan starton, sur aliaj bazoj.

Fine de junio, unu semajnon antaŭ la someraj ferioj, la etoso estas elektreca. La gelernantoj de la 6-a bazlerneja studjaro pretigas sin por la ekzameno pri «socia universo», lernobjekto instruata en la baza kaj meza lernejoj, kiu pritraktas la socian kaj politikan historion de Kebekio. La infanoj malkviete moviĝas sur sia seĝo. Kénia Alvarado-Lara, ilia juna instruistino, anoncas, ke la demandoj aparte temos pri la «folaj» 1920-aj jaroj kaj la demografia eksplodo.

Obtuzaj bruoj aŭdiĝas en la apuda ĉambro. Kelkaj el la personaro — ĉiuj interligitaj per radiokomunikilo — iras al la ĉambro, pretaj por interveni. Interne, la instruistoj jam sukcesis trankviligi



© Robert Etchevery

junulon, kiu frapis la muron. Li kuŝis sur matraceto en spaco apartigita de la aliaj, kaj du intervenintoj restas apud li por lin trankviligi.

Puŝataj de unu lernejo al alia

Tiaj elverŝoj ne estas raraj, precipe fine de la jaro. «Multaj gejunuloj suferis problemojn pri siaj interrilatoj, klarigas la lernejestrino Ysabelle Chouinard, kiu dum 17 jaroj estas instrunta en la lernejo. Je la alveno de ferioj, la lernantoj estas anksiaj. Ili ne scias, kio atendas ilin kaj ili timas la momenton, kiam ili devos adiaŭi

Klerigisto-edukisto ĉe la Centre d'intégration scolaire [Centro de kleriga integrado] ekde antaŭ dudek ok jaroj, Luc FUGÈRE donas instrukciojn al Flora. Aŭskultado kaj empatio estas ŝlosilaj por konstrui fidon kun la lernantoj.

sian instruiston». La bezono de aprezo estas grandega ĉe iuj gejunuloj, puŝataj de unu lernejo al alia, de unu familio al alia.

Necesas scii pritrakti subitajn ŝanĝojn de sinteno, la emocian angoron kaj la perforton, kiu foje postulas polican intervenon. Se la lernejo estas iom granda por la 84 akceptitaj gelernantoj, tio okazas pro la neantaŭvideblaj sintenoj, la



Edukistino Mélanie Bélanger prizorgas la infanojn dum interleciona ripozpaŭzo. En ĉiu klasĉambro, ĉeestas fakulo ĉeestas por helpi la instruiston regi la ŝtormajn kaj kortuŝajn emociojn de la lernantoj.

krioj kaj kvereloj ne permesas kundividi la lokojn kun aliaj gelernantoj.

Por labori ĉe CIS necesas havi fortajn nervojn. Aldone al la direktorino, sociaj asistantinoj, dekduo da instruistoj kaj fakaj edukistoj respondecas pri tiu ĉi unika lernejo en Kebekio. Pluraj instruistoj aŭ staĝantoj venintaj kun la celo helpi la gejunulojn elturniĝi foriras post kelkaj monatoj, malvenkintaj.

Kénia mem konfesas havi doloran rememoron pri sia unua jaro en la institucio. «Mia klaso konsistis el 16 lernantoj de la unua mezlerneja studjaro, kun tre pezaj historioj. En ordinara lernejo, tio estas malfacila aĝo. Sed kun ili, mi devis aldone alfronti la insultojn, la fizikan perforton, la konfliktojn. Mi ofte ploris, kaj mi sentis min persone atakata de la insultoj. Mi ne plu dormis».

Iom post iom ŝi trovis la manieron alparoli tiujn postulemajn gelernantojn. «La interrilatoj, kiujn mi sukcesis starigi kun la gejunuloj, ebligis al mi superi ĉiujn malfacilaĵojn,» ŝi daŭrigas. Kun la tempo, instaligis reciproka respekto. Alia grava elemento estis la konfido de mia estrino. Kiam mi ne plu eltenis, ŝi instigis min

preni unu tagon por ripozo. Gravas zorgi pri si mem.»

Ankaŭ Roxanne Gagnon-Houle, kiu estas instruinta en la Centro dek jarojn, lernis interrilati kun la fortaj emocioj. Ŝi ŝategas sian laboron, kaj la lernantoj amegas ŝin. Nur unu fojon ŝi dubis: la tagon, kiam ŝiaj ripoj estis rompita dum interveno en kverelo. «En la mezlernejo, mi havis lernantojn, kiuj spertis vagadon, toksomanion, psikajn problemojn. La sola maniero interveni estas per la konstruado de konfida rilato. Necesas esti honesta, havi sinceran rilaton kun ili.»

Honesteco. Konfido. Respekto. Empatio. Tiuj vortoj ofte reaperas en la buŝo de instruistoj kaj edukistoj de la Centro. Sen tiuj ligiloj pacience teksataj kun la lernantoj, nenio eblas.

«Oni ne aliras lernanton, kiu havas problemon de opozicio, sammaniere kiel tiun, kiu havas problemon pri rilatoj. Sed en ĉiu okazo, necesas esti trankviliga. Se lernanto insultas min, mi devas preterpasi tion. Estas tagoj, kiam la infano ne kapablas vortigi siajn sentojn. Junulo, kiu

kraĉas aŭ mordas, estas infano, kiu havas ion por diri al mi», klarigas Luc Fugère, faka edukisto kun posteno en la lernejo jam dum 28 jaroj, kies rolo estas helpi la gejunulojn regi proprajn emociojn.

La instruistoj de la Centro spertis kvarjaran universitatan preparon pri lerneja adaptiĝo, fako, kiu permesas instrui al infanoj kun specialaj bezonoj.

Reflamigi la deziron lerni

Ili estas preparitaj por malkovri iujn problemojn, respekti la lernoritmon de disleksia infano, mastrumi la ĉambrom. Sed oni ne ĉion lernas sur la universitataj benkoj. Por reflamigi la deziron lerni ĉe tiuj gejunuloj, kiuj havas probleman rilaton al la lernejo, necesas montri iniciatemon kaj kreivon.

«Kiam mi alvenis, — rakontas Kénia, — mi havis nigran tabulon, kretajn kaj librojn. Kion mi estis povonta fari per ili? Mi konvinkigis, ke mi ne povas labori tie ĉi kiel en ordinara lernejo». Ŝi tiam prunteprenis

projekciilon de sia frato kaj petis porteban komputilon de la lernejestrino. Ŝi pretigis interagajn kursojn, aldonante videojn kaj fotojn kaj sukcesis kapti la atenton de siaj gelernantoj. «Mi ne plu bezonis mastrumi la ĉambron. Mi aldonis tiun metodon al ĉiu lernobjekto kaj mi donis krajonon al la lernantoj por ke ili faru notojn. Tio funkciis!»

Instruistino por la tria lernoĵaro, Emma Chouinard-Cintrao kompletigas sian universitatan diplomon pri lerneja adaptiĝo. Ŝi estas instruinta en la Centro nur dum kelkaj monatoj. Por instigi al lernado, ŝi ne hezitas eliri el la kutimaj framoj kaj aliri lernoludojn. Por stimuli ŝaton al matematiko, ŝi aranĝas vendon de suko kaj de dolĉaĵoj ekster la lernejo, por konatigi frakciojn.

Ankaŭ la terapio per dorlotbestoj, disvolvita kunlabore kun fakuloj, estas parto de la terapiaro donata de la Centro. Pluraj bestoj integriĝis al la ĉambroj: kobajoj por la ĉambro de la malgrandaj, triopo de ratoj en la unua fazo de la baza lernejo kaj ĉasputoroj kaj kunikloj en la unua fazo de la mezlernejo. Tagoj de bestoterapio kun fakuloj okazas por helpi iujn lernantojn, ekzemple por helpi ilin komuniĝi. Iuj infanoj pli timemaj lernas fariĝi pli memfidaj per obeigo de hundo, ekzemple.

Tiuj klopodoj fruktodonas. Forpelita el la lernejo fine de la bazlernejo, Andrew, 15-jara, partoprenis plurajn seancojn de kolerregado antaŭ ol li ekfartis pli bone. «Mi estas impulsiĝema, kaj kiam mi ekkoleras, mi kontraŭ ĉiujn batalas. Tie ĉi oni helpis min trovi manierojn ŝanĝiĝi», li rakontas.

Lia deklaro reeĥas al tiu de Joé, 12-jara. «Mi havas problemon pri konduto. En mia antaŭa lernejo, mi la tutan tempon disputadis. Tie ĉi estas homoj por nin bridi, kiam estas kvereloj.»

Tiu pacienca laboro kun la gelernantoj por ebligi al ili esprimi sin, direkta agresemon, ebligas la lernadon. «Komence mi havis la impreson, ke mi instruas por nenio, klarigas Kénia. Mi pensis, ke ili havas tro da kondukataj malfacilaĵoj por progresi pri la lernejaj studoj. Sed fakte ili tre antaŭeniris en la disvolvo de siaj kapabloj. Estas tiom multe da manieroj malsame instrui.»

Ju pli junaj la lernantoj alvenas, des pli ili sukcesas reintegrigi en la ordinara lernejo, klarigas Ysabelle Chouinard, kiu mencias okazojn pri lernantoj, kiuj plene sukcesis foririnte el la Centro, kiel Stéphanie, nun en magistriĝo pri komunikado, aŭ alia lernanto, kiu aliĝis al profesia korbopilkada teamo en Usono.

“La sola maniero interveni estas per la konstruado de konfida rilato. Necesas esti honesta, havi sinceran rilaton kun ili,”

«Oni ne nepre celas universitatajn studojn por ĉiuj, — insistas la direktorino de la Centro. — Gravus, ke ili povu kontentigi sin. Konduki ilin al la plenkreskula vivo jam estas multe.»



El la franca lingvo tradukis **James Resende Piton** (Brazilo)

Sociala laboristino Pascale Montcalm (maldekstre) kaj instruistino Emma Chouinard-Cintrao klopodas trankviligi la krize histerian lernanton, per kiel plej milda traktado.



© Robert Etchevery

La lernejo sub ponto

en Nov-Delhio

Sébastien Farcis, franca korespondanto en Nov-Delhio

Dum la lastaj naŭ jaroj Rajesh Kumar Sharma [raĝeŝ kumar ŝarma] funkciigis improvizitan lernejon inter du kolonoj de la supertera fervojo, kiu trafikas en la barata ĉefurbo. Pli ol 200 malriĉaj infanoj el la ĉirkaŭaj kvartalaĉoj frekventas ĉi tiun liber-aeran klas-ĉambron ĉiutage.

Ĉi tiu lernejo ne aperas sur iu ajn mapo. Ĝi ne havas kompletajn murojn aŭ kompletan tegmenton, kaj ni ne parolu pri seĝoj kaj tabloj. Kiel la malgrandaj strataj vendejoj, kiuj vivigas la baratan ĉefurbon, la “Free School under the Bridge” [Libera lernejo sub la ponto] simple eniĝis en la urban spacon de Nov-Delhio [naī dillī]. Ĝi niĉas inter la gigantaj kolonoj de la supertera fervojo de ĉi tiu grandega urbo kun 20 milionoj da loĝantoj. Kaj dum la lastaj naŭ jaroj ĉi tiu lernejo provizis per senpaga instruado centojn da malriĉaj infanoj de la ĉirkaŭaj kvartalaĉoj de la riverbordoj de la rivero Jamuna [Yamuna, foje nomata Ĵamuna dʒəmona:] – nenies tereno situanta en la koro de Barato, kiu estas prospera en kelkaj lokoj, sed severe super-amas-loĝata.

La kvartalo estas beton-griza, kaj la ĉielo estas malalta kaj peza en ĉi tiu sezono de musono. Sed la strata lernejo estas plena je vivo kaj koloroj. La tri vandoj, kiuj enfermas ĝian spacon estas pentritaj ĉiel-bluj, kun arbaro de altaj arboj kaj gigantaj rozoj ĉirkaŭantaj la kvin nigrajn tabulojn, kiuj pendas de la malantaŭa muro. Tuj, kiam ili ekvidas la instruiston, la lernantoj kuras al li el ĉiuj flankoj kaj krias “Namasté, instruisto!” La homo tiel estimata de la infanoj estas Rajesh Kumar Sharma, 49-jara, fondinto de la “Free school under the bridge”. Li konsideras sia misio helpi rompi la malriĉeco-ciklon per plibonigo de la kleriĝo de la plej malriĉaj.

Persona repravio

Lia lukto estas ankaŭ persona venĝo. Sharma, kiu venas el malriĉa familio de naŭ infanoj en la agrikultura subŝtato de Utarpradeŝo [Uttar Pradesh] en la norda parto de la lando, ĉiam volis studi, sed li ne povis fini la universitaton, ĉar al li mankis la rimedoj. “La lernejo estis sep kilometrojn for de mia hejmo,” li diras. “Mi bezonis pli ol unu horon por bicikli tien. Kiam mi estis en la supera lernejo, mi ĉiam maltrafis ĥemion, kiu estis en la unua instru-horo. Kiel rezulto mi ne ricevis bonajn poentojn en ĉi tiu fako kaj ne povis iri plustudi inĝenier-arton, kio estis mia revo.”

Sharma ĉiuokaze sukcesis ricevi ateston de supera lernejo, atesto, kiun neniu el liaj ok pli aĝaj gefratoj sukcesis atingi. Li registriĝis studento ĉe la universitato, vendinte siajn librojn por pagi la koston de la registriĝo. Por alveni tien li devis veturi pli ol kvardek kilometrojn per biciklo kaj aŭtobuso. Sed post unu jaro, la maljunaj membroj de la familio ĉesis provizi la monon por lia studado. Lia revo estis haltigita.

La posta fazo en la vivo de Sharma estis plena da defioj. Kiam li estis ĉirkaŭ 20-jara li transloĝiĝis al Nov-Delhio kun sia frato. “Mi vendis akvomelonojn, laboris en konstruejoj, faris ĉion, kion mi povis fari por gajni kelkajn rupiojn,” li rememoras. Iam, en la konstruejo de la fervojo, li estis ŝokita vidi la infanojn de la konstruistoj vagi tra la konstru-restaĵoj, Multaj el ili entute ne estis en la lernejo. Unue li proponis al ili dolĉaĵojn kaj vestojn kaj poste pensis doni al ili pli daŭran helpon. Kaj tiel en 2006, sub arbo, li komencis helpi du infanojn pri iliaj hejmtaskoj. Unu el ili, nun 18-jara, ĵus eniris la universitaton, kaj volas iĝi inĝeniero.

Kvar jarojn poste, en 2010, li starigis ĉi tiun improvizitan lernejon sub la ĵus konstruita supertera ponto, kie nun li bonvenigas pli ol 200 lernantojn ĉiutage – en niveloj, kiuj iras de la unua jaro de la baza lernejo al la tria jaro de la mezgrada lernejo. La lernantoj estas dividitaj en du grupojn, knaboj en la mateno kaj knabinoj en la posttagmezo, dum almenaŭ du

horoj por ĉiu grupo. La plejmulto el ili frekventadas ankaŭ la lokan lernejon, sed venadas al li por instrua helpo. “Ni havas sesdek tri lernantojn en mia klaso,” diras Mamta, 13-jara, kiu vizitas la trian jaron de la mez-lernejo. “Foje ni ne sukcesas kompreni ĉion, kaj do ni venas demandi sinjoron Rajesh.”

Lernantino de bazlernejo ĉeestas la klason de la hinda lingvo ĉe la improvizita “subponta lernejo” en Nov-Delhio [naī dillī]. Rajesh Kumar Sharma, kiu entreprenis la lernejon, videblas en la fono, instruanta aliajn lernantojn.



Klasoj subĉiele

Estas multaj aliaj infanoj, kiuj ne vizitadas lernejojn ĉar iliaj gepatroj — elmigrintoj aŭ neformale dungitaj laboristoj — ne havas dokumentojn. Sharma helpas ilin akiri la dokumentojn, tiel, ke ili povu enskribi siajn infanojn en la lernejon. Li faras tion senpage, danke al la ne tro grandaj enspezoj de la familia manĝajvendejo kaj al hazardaj donacoj. Ĝis nun li rifuzis krei neregistaran organizaĵon (NRO). “Tio estas maniero eviti administraĵojn, sed ankaŭ mi timas, ke ĉe formala strukturo, la fervojaj instancoj timos, ke ni fiksiĝis, kaj forpuŝos nin el sia tero,” li klarigas. Sed pro manko de laŭleĝa organizaĵo, donacoj estas ricevataj en lia persona nomo, kio lastatempe elmetis lin al kritikoj. “Mi faras mian plejblon, sed mi ne povas provizi fakturon, se mi uzas la donacitan monon por manĝigi la infanojn,” li diras. Por forigi tiujn dubojn li ĉesis akcepti monon kaj nur ricevas donace vestojn, manĝaĵojn kaj librojn.

En ĉi tiu varmega julia posttagmezo la leciono en la libera aero estas iom

“Sharma konsideras, ke lia misio estas helpo rompi la malriĉeco-ciklon per klerigado de la plej malriĉaj,”

malorganizita. La 105 lernantoj estas dividitaj en grupojn de malsamaj niveloj. Tri instruistoj, ĉiuj volontuloj, helpas Rajesh Kumar Sharma kaj devas krei, kiam ili montras literojn sur la nigra tabulo, por kovri la bruon de la fervojo super iliaj kapoj. Unu instruisto plejeble klopodas por reteni la atenton de la plej junaj lernantoj. Sharma, intertempe, okupiĝas pri interpretado de teksto en la hindia por rondo de kvin tre atentaj knabinoj. “Ni uzas la nacian lernolibron, kaj ni faras ĉion, kion ni povas per la malmultaj rimedoj, kiujn ni havas, por helpi ilin progresi,” klarigas ĉi tiu

improvizanta instruisto. “En la malnovaj tempoj lecionoj okazis en la libera aero, kaj tial mi ne kredas, ke estas esence havi fermitaj la lerno-ĉambrojn por bone instrui. En Barato oni diras, ke la plej bonaj lotusaj floroj naskiĝas en marĉoj.”



El la franca lingvo tradukis **Renato Corsetti**
(Britujo)



Mohamed Sidibay: la rolo de instruistoj estas redoni al ni nian fidon



© Stefanie Glinski/AFP

Intervjuo de Agnès Bardón, Unesko

Orfo aĝa kvin jarojn, eksa infano-soldato dum la interna milito en Sieraleono, Mohamed Sidibay eliris el ĝi danke al la lernejo. Nelacigebla defendanto de klerigado, precipe kadre de la Monda Partnereco por klerigado, li diras, ke li dankŝuldas al instruistino, kiu scipovis etendi la manon al li.

Oni vin rekrutis kiel infanon-soldaton ekde via plej juna aĝo. En kiu kunteksto oni faris vin lernanto?

Tio estis en 2002, unu jaron antaŭ la fino de la milito en Sieraleono. Mi partoprenis en programo de UNICEF de senarmigo, de malmobilizado kaj de reintegrado de la infanoj-soldatoj. Mi aĝis preskaŭ dek jarojn. Mi neniam estis en la lernejo. Ĉio, kion mi sciis fari, estis ŝargi la mitraleton AK-47. Sed UNICEF certigis, ke mi fariĝu lernanto, per tio, ke ĝi donacis al mia elementa lernejo librojn, kraĵojn kaj ilaron. Sen tiu apogo, la historio de mia vivo estintus sen ajna dubo tre malsama ol tia, kia ĝi estas hodiaŭ. Iri al la lernejo vekis mian scivolemon lerni, kaj estas tiu scivolemo, kiu daŭre estas mia ĉefa instigo hodiaŭ.

Ceremonio por liberigi infanajn soldatojn en Jambio [yāmbiyū], Suda Sudano, en februaro 2018. Laŭ pritaksoj, pli ol 250 000 infanoj tutmonde ankoraŭ rekte aŭ nerekte partoprenas en armaj konfliktoj.

Post tio, kion vi travivis, kiel pasis la unuaj lernejaj tagoj?

La unuan fojon, kiam mi trovis min sidanta en klasĉambro, mi estis perdita. Mi sentis min perdita. Mi ne sentis min sur mia loko. Sed antaŭ ĉio, mi sentis min sola. Dekjaraĝaj, la plejmulto el la infanoj, kiuj estis tie, sciis literumi sian nomon, legi, skribi kaj kalkuli. Mi mem ne sciis fari ion ajn el ĉio ĉi. Mi hontis kaj ne sentis min bonvena inter ili. Sed mi daŭrigis, ne ĉar mi konsciis la gravecon de klerigado, sed ĉar la lernejo, malgraŭ ĉio, estis la plej sekura loko por mi.

Kiaj estis viaj rilatoj kun la instruistoj?

Elkreskinte dum la milito, mi malfidis la plenkreskulojn. Je kontakto kun ili, mia nura celo estis fari min tute malgranda por ne altiri ilian atenton. Esti nevidebla estas la nura maniero postvivi intercivitane militon. Komence, miaj interrilatoj kun la plejmulto de niaj instruistoj ne estis bonaj. Ilia kolero pri la perdo de ĉio dum la milito, mia frustrigo fronte al tio, kion mi mem perdis, kaj mia timo de plenkreskuloj igis la rilatojn malfacilaj. Mi estis tre tentata forlasi ĉion.

Ĉu vi memoras aparte iun instruiston?

Kiam oni estas nur unu el 80 lernantoj en publika lernejo de kvartalaĉo, oni estas nur unu vizaĝo inter la aliaj. Sed unu instruistino impresis min por ĉiam. Ŝi estis speciala pro multaj kialoj. Infano senhejma, mi havis nenion por manĝi dum la lunĉo. Do, de tempo al tempo, ŝi dividis sian manĝon kun mi. En la klasĉambro ŝi ne venigis min al la tabulo, ĉar ŝi konsciis, ke, ĉar mi ne scias legi, la aliaj lernantoj primokus min.

Kaj tiam ŝi havis la bonan ideon sidigi min apud la plej brila knabino el mia klaso, kiu iĝis mia gvida instruistino. Kaj eĉ se ŝi sciis, kia estas mia vivo ekster ŝia klaso, ŝi ĉiam demandis pri novaĵoj de mia tago. Kiam ŝi komprenis, ke mi ne ŝatas la lernejon, ŝi havis sufiĉe da saĝo por ne devigi min. Tiurilate, ŝi faris kion ŝi povis

por ke mi sentu min sekura. Ŝi sciis, ke se mi sentos min bona, mi daŭre venados al la lernejo. Kaj ŝi pravis. En tia speco de sinteno oni rekonas bonan instruiston.

Laŭ vi, kiel la instruistoj povas trakti infanojn suferantajn de traŭmatoj?

Ĉiam venas momento, kiam milito finiĝas. Sed la cikatroj, kiujn ili lasas en la vivo de viroj kaj virinoj, daŭras la tutan vivon. La instruistoj estas la metiistoj de la rekonstruo de la komunumo. Ilia laboro ne nur konsistas el tio, ke ili transdonas sciojn, sed ankaŭ ke ili certigas, ke la infanoj sentu sin sekuraj. Ili devas kompreni, ke la infanoj, kiel mi, venas el mondo, kie la plenkreskuloj ne nur ne sukcesis protekti ilin, sed ankaŭ ŝtelis ilian infanecon kaj ilian senkulpecon. La unua afero, kiun ni vidas, kiam ni eniras la klasĉambrojn, ne estas instruistoj, sed plenkreskuloj, pretaj ekspluati nin ree. La rolo de la instruistoj estas do redoni al ni la memfidon. Komence, oni ne iras al la lernejo kun deziro lerni, kun la ideo plenkreskiĝi kaj esti pli bonaj civitanoj. Foje, ĉio, kion mi bezonis, estis nur, ke iu sidigu apud mi.

Kiel helpi la instruistojn akcepti la defion?

Necesas rimedoj. Ofte la instruistoj, kiuj praktikas en militaj zonoj aŭ en regionoj en situacio de post-konflikto, ne disponas adaptitan trejnadon. Fakte, ilia laboro konsistas malpli en transdono de scioj ol

retenado de la lernantoj ĝis la fino de la jaro. Ili ne sukcesas inspiri siajn lernantojn, ne ĉar al ili mankas la imago, sed ĉar la firmteno de la disciplino pleje gravas. Jen kial oni devas doni la rimedojn al la instruistoj, precipe per adaptita kapablo, ke ili plene ludu sian rolon rilate la infanojn, kiuj suferis.



El la franca lingvo tradukis Kees Neefft (Nederlando)



Bildo el la mallonga filmo Mohamed Sidibay: Teaching Peace [Mohamed Sidibay: Instrui pacon], farita de La projekto MIA HERO, senprofitcela kleriga organizo kun sidejo en Usono.

© permission provided by The MY HERO Project (myhero.com)

Endas pli bone prepari instruistojn por prizorgi la traŭmatizitajn infanojn

Inter la migrantaj infanoj kaj la rifuĝintoj havantaj la aĝon vizitadi lernejon, multnombraj estas tiuj, kiuj suferis traŭmatigajn spertojn, ĉu antaŭ forlasi sian hejmon, ĉu dum sia vojaĝo aŭ en la komunumo aŭ lando, kie ili trovas rifuĝon. Por instrui al tiuj senprotektaj infanoj, necesas adaptita trejniĝo, kiu ofte mankas al la instruistoj.

Tio estas la konstato, kiun la Monda analiza raporto pri klerigo [Global Education Monitoring Report] (GEM) prezentis en la dokumento titolita Education as healing: addressing the trauma of displacement through social and emotional learning [Klerigo kiel kuracado: trakti traŭmatecon per socia kaj emocia aliro], prezentita junio 2019]. Tiu publikaĵo substrekas la neceson pli bone prepari la instruistojn cele alporti psikosocian apogon al la infanoj, kiuj bezonas tion.

En Germanujo, kvinono de la rifuĝintaj infanoj suferas post-traŭmatan streĉon. La neplenaĝuloj, kiujn ne plu akompanas gepatroj, estas ege vundeblaj. Triono de la 160 infanoj neakompanataj petatantaj azilon en Norvegujo, devenantaj el Afganoj, Islama Respubliko Irano kaj de Somalujo, suferas post-traŭmatan streĉon. Inter la 166 infanoj kaj adoleskantoj rifuĝintaj neakompanataj en Belgujo, 37 ĝis 47% prezentas simptomojn de anksio «gravajn aŭ ege gravajn», de deprimado kaj de post-traŭmata streĉo.

La niveloj de traŭmatismoj ĉe la personoj, dislokitaj en landojn kun malmultaj kaj mezaj enspezoj, estas same altaj. Ekzemple, 75% el 331 infanoj dislokitaj en la rifuĝejojn sude de Darfuro, en Sudano, prezentis sindromon de post-traŭmata streĉo, kaj 38% prezentis simptomojn de deprimado.

Pro manko de centroj prizorgantaj la sanon, lernejoj ludas ofte ĉefan rolon en la estigo de stabileca sento. Sed tio povas funkcii kondiĉe, ke la instruistoj havu konojn pri la simptomoj de la traŭmatismoj, por pli bone subteni la lernantojn. Sed en Germanujo, la plejmulto de la instruistoj kaj klerigistoj deklaras senti sin nesufiĉe preparitaj por respondi al la bezonoj de la rifuĝintaj infanoj. En Nederlando, 20% el la instruistoj, kiuj havas pli ol 18 jarojn da didaktika sperto, deklaras travivi multajn malfacilaĵojn, kiam ili interagis kun traŭmatizitaj lernantoj.

La analizo de la porinstruadaj strukturoj kaj de la protektado de la frua infanaĝo koncerne la infanojn rifuĝintajn en Eŭropo kaj en Norda Ameriko evidentigis la jenan fakton: malgraŭ ke multnombraj programoj akceptis kiel veran la gravecon provizi per flegado, la taŭga trejnado kaj la monrimedoj «mankas preskaŭ tutmonde».

El la franca lingvo tradukis Maria Butan (Rumanujo)

Kongo: instrui en klaso kun 76 lernantoj

**Laudes Martial Mbon,
konga ĵurnalisto**

Instruisto en la elementa lernejo *La Poudrière* en Brazavilo de Kongo, Saturnin Serge Ngoma instruas ĉiutage la geometrion kaj la konjugaciojn al klaso plenplena. Jen ĉiutaga batalo en lernejo, kie mankas ĉio.

En la polveca korto de la elementa lernejo *La Poudrière*, la krioj mutiĝis ekde la komenco de junio, kun la komenco de la lernejoj. Nur la zumego de aviadilaj motoroj de la flughaveno *Maya-Maya* de Brazavilo, kies aviokurejo estas disigita de la lernejo per simpla gudrita vojo kaj kelkaj loĝejoj, perturbas fojfoje la kvieton de tiu varma somerposttagmezo.

Antaŭ nur kelkaj semajnoj, 76 lernantoj — 27 knaboj kaj 49 knabinoj — ĉiumatene tuj post la sepa horo kunpremiĝis en la klasĉambro de la unuajara mezgrada kurso — la antaŭlasta nivelo de la elementa ciklo, de Saturnin Serge Ngoma. «Se mi aldonas la ses infanojn, kiujn mi havas hejme, mi prizorgis 82 infanojn ĉi-jare. Lacege...», kun rideto diras ĉi tiu grandegulo, alta pli ol unu metron kaj okdek, sidante ĉe la piedo de mangarbo.

La elementa lernejo, kies nomo venas de la kvartalo, kie pulvejo estis instalita antaŭ la sendependeco, estis lia plej unua posteno ekde kiam lin varbis la ŝtato, en 2017. «Oni povas diri, ke mi simple bonŝancis», diras li montrante la lernejoĝejoj, du simplajn improvizitajn kabanojn, kiuj ŝirmas ses kursoĉambrojn, ĉirkaŭitajn de alta herbo kaj de pornutraj ĝardenoj. Dum pluvotagoj, la batita grundo de la korto iĝas glua koto. La lernejo ne fermiĝas. Dum la tuta jaro la instruistoj gvidas kursojn kun malfermita pordo, rigardate de la preterpasantoj, kiuj trairas la korton por iri de unu punkto al alia de la kvartalo.



La instruisto Saturnin Serge Ngoma en la improvizita kabano de la lernejo La Poudrière en Brazavilo.

Regno de l'elturniĝemo

Ĉio mankas en tiu ĉi konstruaĵo sen ĉirkaŭbariloj, kiu ne havas eĉ necesejon. Komence de la jaro, antaŭ ol pliaj tabloj estis trovitaj, la lernantoj de Saturnin Serge Ngoma kunpremiĝis ĉe la skribotablo po kvar. La aliaj sidis senpere sur la nuda tero. Fronte al tiu senhavelo

© Laudes Martial Mbon

Instruistoj de la maleblo:

de la klasĉambro al la granda ekrano

la elturniĝemo venas en la tagordon. «La lernantoj kolektis tabuletojn, sur kiuj ili sin instalas. Tio estis tute ne facila situacio», suspire diras la instruisto.

La infanoj devis ankaŭ disdividi kelkajn kurslibrojn, kiujn disponas la lernejo, kuniĝante tri-aŭ-kvarope por fari ekzercojn aŭ dum la legadotempo. La situacio estas des pli kriza pro tio, ke multaj lernantoj suferas lernajn malfacilaĵojn. La lernado de la franca aparte klopodigas ilin. «Necesas atenti dum la legekzercoj, ĉar pro nebona regado de la lingvo, iuj lernantoj legas ion alian ol la tekston. Ili elpensas.»

Ankaŭ ne estas facile respektigi la disciplinon al tro da lernantoj. Por ne perdi la regon, la instruisto uzas tute personan metodon. La unua estas irigi la pli senpaciencajn misagemajn lernantojn al la nigra tabulo. «Ili timas, ke ili ne scios kiel fari la ekzercon fronte al la aliaj, tial ili agas por ne trafi en tiun situacion. Se ili estas malkvietaj, mi donas al ili punojn — konjugi verbojn, kaj en pli gravaj okazaĵoj, mi irigas ilin purigi la korton.»

Malgraŭ tiuj malfavoraj kondiĉoj, 62 lernantoj de la klaso de Saturnin Serge Ngoma estis akceptitaj en la supera kurso fine de sia lerneja jaro. Li fieras, ke unu el liaj lernantoj iĝis la plej sukcesa el la tuta lernejo kun meznombraj poentoj de 12,5.

Diplomita magistro pri ekonomiko de daŭripova evoluo, tiu instruisto kvardekjaraĝa fariĝis instruisto malfrue, post laboro en gardoentrepreno kaj instruado en privataj institucioj. Tamen, malgraŭ malfacila ĉiutageco kaj bagatela salajro, li ne antaŭvidas praktiki alian profesion.

Venontan septembron, li reiros la vojon, kiu gvidas lin post duonhora piedirado de sia kvartalo *La Frontière* ĝis la lernejo *La Poudrière* (Pulvejo). «Majstro Ngoma, — resumas Guelor, unu el liaj antaŭaj lernantoj, — ĉiam rediras al ni, ke li konas ne multe da personoj, kiuj sukcesis sen vizitadi lernejon».



El la franca lingvo tradukis **Pjer Tell Bouvier**
(Francujo)

«Redoni al la instruistoj ilian kvaliton de grandpovaj vivherooj, ĉar ili ŝanĝas la sorton de la geknaboj, kiuj siavice ŝanĝos la estonton de la mondo». Jen la ambicia celo de la dokumenta filmo *Instruistoj de la maleblo* (provizora titolo), nuntempe realigata fare de la franca produkta kompanio *Winds* ["Ventoj"]. La ideo, inspirita de Unesko, kiu estas partnero en la produktado de la filmo, estas montri, pere de pluraj portretoj, instruistojn, kiuj zorgas pli ol tiom, kiom la profesio normale postulas, kaj montri la universalismon de ilia engaĝiĝo.

Sandrine en Burkino, *Taslina* en Bangladeŝo kaj *Svetlana* en Siberio (Ruslando) estas tiaj heroinoj, ĉiu siamaniere. Kun siaj profesiaj alvokiĝoj en la koro, la tri instruistinoj en la filmo, por sukcesi instrui al siaj klasoj, transiras plurajn obstaklojn: nestabilajn infrastrukturojn, geografian izoliĝon, ekstremajn klimatkondiĉojn, interrompojn en la instruado, kulturajn problemojn, nomadecon... Adaptiĝemaj, kaj pretaj por multaj sinoferoj, tiuj virinoj, kiel milionoj da aliaj instruistoj tra la mondo, travivas ĉiun tagon kiel efektivan aventuron, ĉefe pedagogian, sed ankaŭ homan kaj fizikan.

Svetlana, ekzemple, faris la malfacilan decidon lasi siajn infanojn por porti klerigon ĉe la tendaroj de la boacbredistoj — evenkoj, aŭtoktona popolo de la Orienta Siberio. Per sia nomada lernejo, monde unika, kiu okazas sur sledo, kaj sia edzo, kiu mem estas boacbredisto, ŝi sekvas la nomadojn tra la siberia tajgo. La produktisto de la filmo, Barthélémy Fougea, daŭre miras pri la izoleco de la regiono: «Dum mia tridekjara kariero, mi neniam havis produktovojaĝojn tiom

longajn». La filmteamo, fakte, bezonis septagan vojaĝon por atingi la lokojn, komence aviadile, poste per trajno kaj kamiono, kaj fine per motorsledo. Malantaŭ tiu engaĝiĝo de *Svetlana* estas defio igi la nomadajn infanojn senti sin esti kaj Rusoj kaj Evenkoj samtempe. Temas ankaŭ pri defio tute persona, ĉar la instruistino, naskiĝinta dum la soveta epoko, estante Evenka mem, estis sendita al internula lernejo, kio forigis ŝin de la tradicioj de ŝia popolo.

Nun en la fazo de postfilmada pretiĝo, tiu ĉi longa filmo, realigata fare de Émilie Thérond, aperos sur la ekrano en 2020. Ĝi estas parto de *transmedia* [rakontata per diversaj manieroj kaj ciferecaj iloj] projekto, kiu enhavas, inter alie, televidserion, librojn, infanlibrojn kaj ankaŭ ekspozicion. Samtempe estas starigataj helpoj celantaj subtenon al la klerigado kadre de la asocio «Survoje al la lernejo», kiu prenas sian nomon de la filmo, kiu mem gajnis plurajn internaciajn premiojn, realigita en 2013 fare de *Winds*, same partnerece kun Unesko.



la franca lingvo tradukis **Norberto Saletti** (Italujo)

Ankoraŭ de la pafado de la dokumentario, *Teach Me If You Can* [Instruu min, se vi povas, aŭ Instruistoj de la malebla]. *Taslina*, bangladeŝa instruistino, laboras sur floslemejo ebliganta la solan manieron plu instrui lernantojn en lando forte trafita de pliiĝantaj inundoj.



© Sumon Delwar

Instrui malantaŭ la kradoj en Valparaíso

Carolina Jerez Henríquez, Regiona Oficejo de Unesko en Santiago, Ĉilio

En la supra parto de la havenurbo Valparaíso, ĉe la ĉilia marbordo, la lernejo Juan Luis Vives ekzistas ekde 1999. Nuntempe la lernejo akceptas 550 gelernantojn, kaj ĝin karakterizas la situo ene de la malliberejo de Valparaíso. Ĉiutage, la instruistoj, kiuj tie laboras, devas alfronti la malfacilaĵojn de la prizona mondo, la malsamecojn de lernaj kapabloj kaj la bolantajn emociojn. En 2015 tiu ĉi klerigejo gajnis la Internacian Konfuceo-Premion de Unesko por Alfabetigo.

Fore de la historia centro de la urbo, kiu estas Monda Heredaĵo de Unesko, la malliberejo de Valparaíso troviĝas en kvartalo senŝirma kontraŭ la vento, for de la turistaj itineroj kaj meze de unu el la plej vundeblaj urbo-areoj. Tie estas la lernejo Juan Luis Vives, kie lernas malliberuloj, kiuj vizitadas ĝin por rekomenci sian interrompitan lernadon aŭ lerni en kursoj pri profesio. En ĉiuj okazoj temas pri pli bona sinpreparo por la vivo, kiu ilin atendas ekstere, tuj post kiam ili trapasas siajn kondamnojn.

En la lernejo Juan Luis Vives ĉiu tago estas malsama. “Ne eblas anticipi la okazontaĵojn, kaj ĉio multe dependas — klarigas al ni la instruisto- ĉu okazas io ene, aŭ ĉu, ekzemple, oni traserĉas aŭ inspektas la prizonulojn. Kelkajn tagojn oni povas havi normalan horaron. Aliajn tagojn oni eĉ ne povas instrui”.

Sonia Álvarez estas instruistino pri historio kaj civitana klerigo. De antaŭ 40 jaroj ŝi laboras por la rajto je klerigo en

prizono. “Antaŭe mi havis la impreson, ke io mankis en mia vivo. Nun mi scias, ke mia laboro estas nemalhavebla”, ŝi diras suprenirante la ŝtuparon survoje al la dua etaĝo de la lernejo, spaco tute nova, kiun ŝi mem konceptis kaj konstruigis kadre de la malliberejo danke al publikaj kaj privataj fondusoj.

Kun tiuj ĉi malfacilaĵoj tipaj por la karcerita realo, la lernejo donas instruon bazan, mezan kaj tekniko-profesian ligitan al la gastronomio kaj publika nutrado, kio ebligas al la malliberuloj havi postenon kaj pliiĝi siajn ŝancojn trovi laboron post kiam ili elprizoniĝos.

Doni sencon al ĉies vivoj

Laŭ la Nacia Kunordiga organo pri klerigado de gejunuloj kaj adoltoj de Ĉilio, en 2018 ekzistis 72 klerigejoj ene de la landaj malliberejoj. La lernejo Juan Luis Vives apartenas al tiu ĉi reto, kaj la kunlaborantoj de Sonia Álvarez kredas, ke klerigo estas liberiga procezo, kiu renovigas la socian kondiĉon de la individuo — kiel dirus la brazila pedagogo Paulo Freire — kaj en la malliberejo kaj ekster ĝi, kaj helpas ilin pripensi kaj doni sencon al tiu ĉi procezo.

Instrui en tiuj ĉi kunteksto estas ĉiutaga defio. «Ĝi multe rilatas al la motivado de la instruisto kaj koncepto pri kvalita klerigo, kiu estu adekvata por la lernantaro», klarigas Jassmin Dapik, unu el la instruistinoj. «Ĉi tie esencas, ke la instruisto havu la necesan kreivemon, por ke la instruado estu utila. Kiel instruistoj ni bezonas kapabligi ilin por plia lernado, kaj ĉefe, por ke ili kapablu kondukti kiel civitanoj kaj fari ĝustajn decidojn, ŝi aldonis.

Tamen la rolo de la instruisto ne limiĝas al transdono de scioj, sed kontribuas ankaŭ al tio, ke la malliberuloj rehavigu

al si parton de sia memestimo. “Unu el la plej gravaj aferoj estas, ke la instruistoj ne traktu nin kiel malliberulojn”, asertas José, kiu plenumas karcerpunon en Valparaíso kaj regule ĉeestas la kurson. “Por ili ni estas personoj, kiuj havas dignon kaj rajtojn, kaj ili volas, ke ni eliru estante pli bonaj personoj ol kiam ni eniris ĉi tien, kaj por tio ili devas havi empaton», precizigis Carlos, alia malliberulo. «Pro tiu trajto, kiam ni estas en la lecionoj kun la instruistoj, ni ne sentas nin en malliberejo, sed kiel liberuloj», li aldonas.

Kiam la lecionoj estas ekster la karcerita realo, estas privilegiaj momentoj, dum kiuj liberiĝas la parolo por la rakontoj malfacile direblaj. «Mi nomas ilin supervivintoj, kaj ĉi tie, malantaŭ ĉiu persono, ekzistas teruraj dramoj, kaj oni kiel instruisto devas asimili tiun informon kaj konstrui dinamikojn por alfronti tiun ĉi realon. La gelernantoj malpliigitas ĉiusence. Pli ol la scienca instruado, ni okupiĝas pri savado de la homa estaĵo», klarigas Leopoldo Brazo, alia instruisto.

Jessica León estas psikologino, kiu subtenas la laboron de la instruistaro en tiu ĉi lernejo kaj instigas la gelernantojn esti pli malfermaj al la lernoprocezo, danke al la Programo de Lerneja Integriĝo [Programa de Integración Escolar] (PIE), kiu ebligas subteni la instruistan laboron. “Ĉi tio tre necesas, — diras Jessica, — ĉar en tiu ĉi kunteksto ili devas multe strebi por plenigi iel ajn la mankojn de la prizonuloj en la studa kaj emocia kampoj. Por ni, kiel teamo, tre gravas teni harmonion en kunteksto, kie ekzistas kontraŭdiraj emocioj”.

La malliberuloj mem agnoskas, ke la instruistoj laborantaj ene de la muroj havas malfacilegan taskon. La lernantoj rakontas, ke ili havas problemojn pri koncentriĝo, kiu kostas al ili, kaj ke ili ne havas la bezonatan tempon por antaŭeniri, kiel ja okazas en “regulaj”

“La instruistoj helpas malliberulojn regajni iom da sia memestimo”

lernejoj. “Ni multe dependas de tio, kion decidas la gardistoj, ni ne havas regulan horaron”, indikas José.

Superi la malfacilaĵojn

Alia esenca defio estas, ke apenaŭ ekzistas planoj kaj studprogramoj speciale dediĉitaj al tiu realo aŭ adaptitaj al la situacio de tiuj lernantoj. Fakte, la instruistoj mem, sen aparta preparo, planas strategiojn kaj agadojn kaj pritaksas enhavojn, por ke la lecionoj estu adekvataj, kaj la lernado estu utila.


Krome, la lecionoj en la malliberejoj kutime estas diversgradaj, kun lernantoj kun diversaj spertoj kaj malsamaj kapabloj, kaj tial, plani lecionon estas nepra tasko kaj ĉiutaga defio. “Ni devas konsideri ĉion-ĉi, kiam ni preparas nian tagon. Ni devas konsideri kion ni estas instruontaj kaj kiujn valorojn ni volas transdoni, ĉar nia kurso baziĝas ĉefe sur konceptoj, ni volas, ke ili konservu ion”, — diras Jassmin Dapik. Por tio, surbaze de la studplanoj de la ministerio pri klerigado de Ĉilio, la instruistaro de la lernejo *Juan Luis Vives* adaptas ilin por personoj kun malsamaj lernaj niveloj kaj diversaj bezonoj.

Aldona defio estas sukcesi samniveligi ilin, ĉar ofte ilia lernado estis interrompata unu aŭ pli da fojoj. Ili travivis multajn interrompojn, kio prezentas grandan defion por laborkapablo. Tiu ĉi historio ripetita ne malentuziasmigas ilin: “Ni scias, ke klerigado transformas, kaj tiuj ŝanĝoj iĝas videblaj tra la tempopaso, tio kontentigas nin”, diras la instruisto Leopoldo.



El la hispana lingvo tradukis **Maritza Gutiérrez** (Kubo)

© posterfortomorrow 2011/Elmer Sosa



[Klerigo estas rajto] Afiso desegnita de meksika grafika artisto Elmer Sosa, pri la temo de rajto al klerigo.

Instruisto alportas esperon

al fora ĉina vilaĝo

Wang Shuo (王烁 Wáng Shuò), ĉina ĵurnalisto

La homoj, kiuj loĝas en Heihumiao (黑虎庙 Hēihǔ Miào) en la Henan-provinco en Centra Ĉinio, ofte revas forlasi la montojn por trovi pli bonan vivon en la urbo. Zhang Yungun (张玉滚 Zhāng Yùgǔn) forveturis. Sed post kiam li diplomiĝis, li decidis reveni al la vilaĝo, kie li plenkreskis — por doni al la infanoj luktan ŝancon.

Se vi foriras de la gubernio Zhenping (镇平 Zhèn píng) kaj iros laŭ la monta vojo al la pinto, kiu leviĝas pli ol 1 600 metrojn super la marnivelo, vi povas vidi la bazlernejon Heihumiao (黑虎庙 Hēihǔ Miào), lokitan en la suba valo. Jen kie Zhang Yungun (张玉滚 Zhāng Yùgǔn) instruas dum la lastaj dek ok jaroj.

La vilaĝo Heihumiao (黑虎庙 Hēihǔ miào) estas for de ĉio. En pli fruaj tempoj vilaĝanoj, kiuj volis forlasi la monton, devis sekvi la spurojn lasitajn de bovoj kaj ŝafoj sur la kresto, grimpi la montopinton kaj poste trapasi la krutan deklivon de Bali-monto. (八里坡 Bā lǐ Pō) La monta vojo estas tiel malebena, ke ne eblas bicikli laŭ ĝi — kutime necesis almenaŭ kvin horoj por supreniri la monton, sen havebla transportilo. La severaj kondiĉoj

signifis, ke malmultaj instruistoj deziras okupi postenojn ĉi tie.

“Se instruistoj de ekstere ne venos ĉi tien, kaj la lernantoj, kiujn ni instruas, ne restos, kiuj respondecos pri la klerigado de la infanoj ĉi tie?” demandas Zhang. Ĉi tiu demando hantis lin, post kiam li vizitis sian antaŭan lernejon, akompanate de la iama lernejestro, Wu Longqi (吴龙奇 Wú Lóngqí), Kvankam li hezitis, pro la malalta salajro kaj la severa medio, li finfine decidis resti. Li promesis al Wu, ke

Pro la foresto de la gepatroj, plejmultaj el kiuj laboras for de siaj hejmoj, la instruisto ĉiutage mem akompanas la lernantojn laŭ la kruta vojo al la lernejo.



© Shasha GUO/China Pictorial



© Shasha GUO/China Pictorial

Pro la manko de instruistoj en la lernejo en sia izolita vilaĝo, Zhang Yugun lernis aliajn profesiojn. Krom matematiko kaj moraloj, li ankaŭ instruas muzikon.

li transformos la vivon de la infanoj, kaj li tenis sian vorton.

Portante esperon sur vekto

Libroj, lernolibroj, kraĵoj kaj skrapgumoj — la lernejo bezonis tiujn ĉi instruajn materialojn, sed ankaŭ bazajn nutraĵprovizojn, kiel oleon, salon, vinagron, legomojn, rizon. Ĉiujn ĉi aĵojn necesis enporti el la urbo. De 2001 ĝis 2006, Zhang portis ĉi tiujn provizojn de la urbo suprenirante la tutan montan vojon, uzante korbojn ligitajn al vekto, kiun li heredis de Wu. Ĉi tiu estis la sola maniero ebligi al la infanoj vizitadi la lernejon kaj doni al ili la eblon forlasi la monton, se ili elektos tion.

Unu vintran tagon, la monta vojo estis tro glitiga por paŝi. Estis preskaŭ la unua tago de lernado, kaj la lernolibroj de la infanoj ankoraŭ estis en Gaoqiu [高丘 Gāo Qiū], urbo pli ol tridek kilometrojn for. Fronte al ĉi tiu deŝo, Zhang kaj alia instruisto rapidis al la urbo frumatene, portante la vekton tra kotaj vojoj. Kiam ili revenis al la lernejo, ŝarĝitaj per la lernolibroj, ili estis preskaŭ tute kovritaj de koto. Sed la libroj restis puraj.

La kondiĉoj pliboniĝis en lastaj jaroj. Ekde 2006 betona vojo ebligas aliron al la vilaĝo, rompante ĝian izolecon. Busoj komencis sporadajn veturojn ekde la vintro de 2017. Zhang nun veturas per

motorciklo por porti lernolibrojn kaj ĉiutagajn necesajojn al la vilaĝo — li ofte estas ŝarĝita per pli ol cent kilogramoj. Sed la kondiĉoj ankoraŭ malfacilas. Ekde la reveno de la instruisto, kvar el liaj motorcikloj rompiĝis, kaj li devis anstataŭigi sennombrajn pneŭojn.

Zhang tamen rifuzas plendi. “Mi opinias, ke ĉiuj miaj klopodoj indas, ĉar la lernantoj, kiujn mi instruis, povis eliri el la montoj,” li diras. Antaŭ ol li fariĝis instruisto en la vilaĝo, li estis la sola studento el Heihumiao (黑虎庙 Hēihǔ Miào), kiu estis frekventanta universitatan kolecion — de tiam la nombro pliiĝis ĝis dudek du.

Diverstalenta instruisto

Pro la manko de instruistoj, Zhang trejniis sin por okupi multajn rolojn. Li estas kaj la direktoro kaj instruisto pri matematiko kaj etika edukado. Dum la lastaj dek ok jaroj, li ankaŭ akiris kapablojn, kiuj iras multe preter la amplekso de lia komenca trejnado. Krom instruado, li laboras ankaŭ kiel kuiristo, tajloro post la lernohoroj kaj eĉ flegisto, en krizoj.

Sed lia rolo por helpi lernantojn iras eĉ plu. Plej multaj el la gepatroj de la

infanoj laboras for de siaj hejmoj, kaj Zhang komprenas la afliktojn, kiujn ĉiuj familioj alfrontas. “Dum ĉiuj ĉi jaroj, neniu el la lernantoj de nia vilaĝo forlasis la lernejon pro malriĉeco, precipe la knabinoj,” diris la estro de la vilaĝo. Zhang persvadis la gepatrojn de lernantoj, kies familioj loĝas malproksime de la lernejo, lasi siajn infanojn vivi kaj manĝi en la lernejaj konstruaĵoj. Subtenate de sia edzino, li helpis la lernantojn lavi kaj ripari siajn vestaĵojn, kaj prizorgis ĉiujn iliajn ĉiutagajn bezonojn. Per sia malgranda enspezo, li finacis pli ol 300 lernantojn, por ke ili povu daŭrigi siajn studojn.

Feliĉe, danke al la helpo de la kleriga departemento, la kondiĉoj en la lernejo daŭre pliboniĝas. La lernejo — en kiu nuntempe estas enskribiĝintaj kvindek unu lernantoj — nun havas novajn dormoĉambrojn, manĝejojn, ludejojn kaj komputilajn klasĉambrojn.

Influitaj kaj inspiritaj de Zhang, kvar emeritaj instruistoj decidis reveni al la montoj por rekomenci instrui. Instigite de socia varbado, hodiaŭ en la lernejo laboras dek unu instruistoj. “Tiel longe kiel la infanoj estos tie, tiel ni estos,” iuj el ili diras.



El la angla lingvo tradukis Sidney Carlos Praxedes (Brazilo)

Zomo



50 - 3 - 10

Unu el tridek ok kontakfolioj [fotoj faritaj per kontakto kun la filmaj kadroj] de fotoj faritaj de David SEYMOUR por Unesko en 1950. La plej multaj el ili restas nepublikigitaj. Ili ilustras la kampanjon kontraŭ analfabetismo en Suda Italujo. Ni vidas plenkreskulan klasĉambbron ĉe

la Popolana Kultura Centro de Rogiano Gravina en Kalabrio. En pluraj okazoj la lenso de la fotisto fokusiĝas sur la manoj de pli maljunaj farmistoj, kiuj, ne tre lertaj pri uzado de la plumo, provas spuri la strekojn de la literoj — iuj, por la unua fojo.

Arĥiva trezoro:

La nepublikigita albumo de David Seymour


**Fotoj: David Seymour/
Magnum Photos**

Teksto: Giovanna Hendel, Unesko

Ĉio komenciĝis en la aŭtuno de 2017, per esplorado de la aŭdvidaj kolektoj de Unesko, post ilia translokado al la arĥivoj de la Organizo. La plej multaj el la kolektoj apenaŭ estis indeksitaj dum sia preskaŭ sepdekjara ekzistado. Promeni tra ĉi tiuj arĥivoj iom aspektis kiel viziti la *Bibliotekon de Babelo* de Jorge Luis Borges. Kun miloj da dokumentoj en la arĥivoj, la sola maniero imagi, kiel la kolekto estas organizita, estis simple malfermi la tirkestojn de la multaj malnovaj arĥivaj ŝrankoj kaj rigardi internen.

Ĝuste malferminte unu el ĉi tiuj kestoj ni faris mirigan malkovron: nepublikigitan albumon de tridek ok kontakfolioj kaj akompanantajn tekstojn de David "Chim" Seymour, unu el la plej grandaj fotistoj de la dudeka jarcento. En 1947 Seymour, kune kun Henri-Cartier Bresson, Robert Capa, George Rodger kaj aliaj elstaraj fotistoj, kunfondis la fotografian kooperativon *Magnum* — nun konatan kiel *Magnum Photos* (Fotoj Magnum).

En 1950 Unesko komisiis al Seymour raportoj pri grava kampanjo kontraŭbatali analfabetecon en Suda Italujo. *Unesko-Kuriero* publikigis artikolon pri la temo en marto 1952, kun fotoj de Seymour kaj la teksto de Carlo Levi, aŭtoro de la fama romano el 1945 *Kristo finhaltis ĉe Eboli*. La libro baziĝas sur tio, kion spertis la itala intelektulo, kiam li estis ekzilita en la 1930-aj jaroj de la faŝismaj aŭtoritatoj al fora regiono, konata hodiaŭ kiel Basilicata antikvece konata kiel Lucania, esperante



Unu el la bildoj de la kontakfolio montrata kontraŭe estis uzata kiel la kovrilo por la numero de marto 1952 de Unesko-Kuriero. Maljuna kampanjo lernas skribi. Dekstre, la mapo de Kalabrio, Italujo, permesas al la leganto lokalizi la raportojn.

Basilikato]. Ĝi rakontas la historion de la vivo de ĝiaj loĝantoj, iliaj moroj, iliaj kredoj kaj la mizero, tra kiu ili baraktis.

Sesdek sep jarojn poste, okaze de la publikigo de la libro *They Did Not Stop at Eboli: UNESCO and the Campaign against Illiteracy in a Reportage by David "Chim" Seymour and Texts by Carlo Levi* [Oni ne finhaltis ĉe Eboli: Unesko kaj la kampanjo kontraŭ analfabeteco en raporto de David "Chim" Seymour kaj tekstoj de Carlo Levi] (1950), kiu reproduktas la tuton de la albumo de Seymour, akompanata de analizaj eseoj, la Kuriero prezentas alian vidpunkton de la verko de la fotisto.

La historia kunteksto de la raporto de Seymour estis la batalo kontraŭ analfabeteco gvidata de la postmilita Itala registaro kaj neregistaraj asocioj kiel la *Unione Nazionale per la Lotta contro l'Analfabetismo* (UNLA), [La Nacia Ligo por la lukto kontraŭ analfabeteco]. Analfabeteco estis tre disvastigita en la sudo de la lando. En iuj regionoj, kiel Kalabrio, kie Seymour vojaĝis por sia raporto, preskaŭ kvindek elcentoj de la loĝantaro estis analfabetaj tiutempe.

Por kontraŭbatali ĉi tiun plagon, UNLA kontribuis al la kreado de multaj lernejoj proponantaj bazajn alfabetigajn klasojn por infanoj kaj plenkreskuloj, post kiam ĝi estis fondita en 1947. La plej originala iniciato de la organizo estis la kreo de Popolanaj Kulturaj centroj tra la lando. Direktate de UNLA-instruisto, plenkreskuloj, kiuj jam profitis de legokapablaj klasoj, povas daŭrigi sian klerigon per demandoj pri sia praktika vivo, sed ankaŭ pli teoriaj demandoj. La UNLA-instruisto provis respondi ilin subtenate de profesiuloj en la komunumo — kiel kuracistoj, apotekistoj, veterinaroj, paroĥestroj ktp.

Unesko unue interesiĝis kaj poste subtenis la Italan kampanjon — klare konsiderante ĝin tre grava, ĉar la raporto

They Did Not Stop at Eboli: UNESCO and the Campaign against Illiteracy in a Reportage by David "Chim" Seymour and Texts by Carlo Levi (1950). [Oni ne finhaltis ĉe Eboli: Unesko kaj la Kampanjo Kontraŭ Analfabeteco en Raporto de David "Chim" Seymour, kun tekstoj de kaj Carlo Levi] (1950), Redaktita de Giovanna Hendel, Carole Naggar kaj Karin Priem. Unesko/De Gruyter, 2020.

estis komisiita al unu el la grandaj fotistoj de la tempo.


Por sia raporto, Seymour ne nur fotis centojn da eventoj, sed ankaŭ verkis tre detalajn notojn por akompani la fotojn. Li disponigis apartajn rakontliniojn aŭ temojn por grupoj de fotoj, kaj eĉ faris sugestojn pri eblaj redaktaj elektoj. Luj, sed ne ĉiuj, de ĉi tiuj elektoj estis sekvitaj en la artikolo en la Kuriero de 1952, kaj nur malgranda parto de la teksto estis uzata. Sesdek sep jarojn poste, venis tempo por inde aprezi tion, al kio Seymour donis atenton.

Ekzemple, tre malmulte da atento estis donita al la skrupulaj observoj de Seymour pri la kondiĉoj de virinoj en la kunteksto analizata. Precipe en la teksto akompananta alian serion de fotoj de virinoj lernantaj legi (inkluzive la foton de la virino lernanta legi kun sia filino, reproduktita en la artikolo de 1952), Seymour emfazas la ligan de la alfabetiga kampanjo kun la faroj por krei egalajn ŝancojn por antaŭenigi socian progreson.

La artikolo en la Kuriero de 1952 ankaŭ reproduktis unu el la fotoj de Seymour de virinoj portantaj ŝarĝojn sur la kapo (en ĉi tiu artikolo, ni reproduktis alian foton de ĉi tiu serio [pĝ. 26], bitigita por *Oni ne finhaltis ĉe Eboli*). Tamen la apudskribo akompananta ĉi tiun foton limigis ĝian rolon. Ĝi estis uzita por ilustrati la fakton, ke la laboristoj devis esti instruataj ĉe vesperaj klasoj, post malfacila tago en la kampoj.

Simile, la artikolo de 1952 reproduktis unu el la fotoj de Seymour de viroj laborantaj en la kampoj. Tamen, ankoraŭfoje, la rolo de la foto reduktiĝis per la apudskribo, kiu ilustrati la malfacilan dumtagan laboron, sekvitane de vesperaj klasoj. Legante la komentojn de Seymour pri unu el liaj serioj de viroj, kiuj laboras sur la kampoj, tamen oni povas aprezi la profundecon de liaj observaĵoj — ĉar li emfazis, ke klerigajn kampanjojn devas akompani sociaj kaj ekonomiaj reformoj.

Ĉi tiu *mise en abyme* [[miz α̃n abim] "rakonto ene de rakonto"] de la Kuriero ilustrati, kiel la arĥivoj de Unesko daŭre lumigas pasintajn kampanjojn, kiuj hodiaŭ restas tute aktualaj — emfazante, kiel ĉi tiuj kampanjoj estis priatentigataj por la legantoj.




Kunmetaĵo de fotoj, kiel ili aperis en la Kuriero, marto 1952

Enskribo de la Kuriero, marto 1952

Post malfacila dumtaga laboro en la kampoj, kampanjoj de Rogiano Gravina frekventas vesperajn klasojn, ofte akompanataj de siaj infanoj. Analfabeteco estas pli vasta inter virinoj ol viroj. Krom legado kaj skribado, al virinoj oni instruas brodadon kaj aliajn manmetiojn. Por la instruado de legado, la sistemo de moveblaj literoj montriĝas tre efika.



After a hard day's labour in the fields, peasants of Rogiano Gravina attend evening classes, often accompanied by their children. Illiteracy is more widespread among women than men. Besides reading and writing, women are taught embroidery and other handicrafts. For the teaching of reading, the mobile letter system proves very effective.



Noto de David Seymour


“Vesperaj klasoj de virinoj pri legado. La problemo de la malgrandaj infanoj de la lernantoj estas pritraktata en diversaj manieroj. Foje ili estas venigataj al la lernejo kaj sidas en la klasĉambro kun siaj gepatroj. Kaze de beboj, la gepatroj alternas — unu restas hejme dum la alia iras al la lernejo laŭ alternaj vesperoj. La malnovaj tradicioj en Suda Italujo, kie la virino estis tenata tre malsupera, ŝanĝiĝas ĉi tie.”

SIAM
100% FRAN
N° 2624

139 - The need for agrarian reform in Southern Italy is recognized by everybody. The Italian Parliament is discussing at present a project of law concerned with agrarian reform. However, poor peasants of Calabria went ahead and started occupying uncultivated land. This occupation is not taking over the land. It means only that the peasants will work the land, harvest the crop, and give the owner the usual share of the harvest which varies from 30 to 40 per cent. The average holdings of Rogiano Gravina peasants and agricultural workers are from two to four acres (the minimum land holding for a peasant family to assure an acceptable standard of living being from 15 to 20 acres). The extent of the occupation goes to one or two acres per family and still doesn't solve the basic problems of living. The occupation was peaceful, with no police or carabinieri present. The man in center, Oreste Rossini, has a family of five, land holding of three acres and is a very active pupil in the evening school of the Centro.



*Foto prenitā el
la kontaktfolio
reproduktita
kontraŭe.*



© David Seymour/Magnum Photos. Photo: UNESCO/Christelle Alix

Kontaktfolio de la nepublikigita albumo de David Seymour. La fotoj montras kamparanojn pace kaj okupiĝante pri nekultivitaj teroj. Ĝi estas akompanata de detalaj faktoj kaj observoj de la fotisto (vidu sube).

Noto de David Seymour

Ĉiuj rekonas la bezonon de agrara reformo en Suda Italujo. La Itala parlamento pridiskutas nuntempe projekton de leĝo koncernanta agraran reformon. Tamen, malriĉaj kamparanoj de Kalabrio antaŭeniris kaj komencis okupi nekulturan teron. Ĉi tiu okupo ne transprenas la teron. Ĝi signifas nur, ke la kamparanoj kulturas la teron, rikoltos la kultivaĵojn kaj donos al la posedanto la kutiman parton de la rikolto, kiu varias de 30 ĝis 40 elcentoj. La mezaj posedoj de kamparanoj kaj agrikulturaj laboristoj de Rogiano Gravina estas de du ĝis kvar akreoj [0,8-16 ha] (la minimuma terposedado por kamparana familio por certigi akcepteblan vivnivelon de 15 ĝis 20 akreoj). La etendo de la okupo atingas po unu aŭ du akreojn [0,4 aŭ 0,8 ha] por familio kaj ankoraŭ ne solvas la bazajn problemojn de vivado. La okupo estis paca, kun neniuj policianoj aŭ carabinieri [[karabi'nje:ri] "karabenistoj" — "milita polico"] ĉeestantaj. La viro en la centro, Oreste Rossini, havas kvinopan familion, posedas tri akreojn [1,2 ha] da terpeco kaj estas tre aktiva lernanto en la vespera lernejo de la Centro.

Noto de David Seymour

“Unu el la multaj bildoj de virinoj portantaj diversajn ŝarĝojn sur sia kapo. Mi havas ĝeneralan ideon, ke ĉi tiuj bildoj povas esti uzataj kiel ia simbola enkonduko en la rakonton. Mi ankoraŭ ne povis trovi la vortan sloganon por ĝi, sed la ĝenerala ideo estas, ke homoj en Kalabrio uzis sian kapon por porti ŝarĝojn, kaj foje tre pezajn ŝarĝojn, kaj nuntempe ili malkovras, ke ili povas uzi sian kapon por kleriĝi.”





Noto de David Seymour

Unua studjaro pri legado por kamparanoj en Rogiano Gravina. Analfabeteco estas multe pli disvastigita inter virinoj ol viroj, kaj la Ligo por Lukto Kontraŭ Analfabetismo precipe klopodas allogi virinojn al vesperaj klasoj. Krom legado kaj skribado, la virinoj estas instruataj pri brodado kaj aliaj metioj, kaj iliaj vesperaj klasoj estas dividitaj inter legado, skribado kaj kudrado. La tre sukcesa aparato de brodado de la literoj kombinas ĉion en unu. Por legado, la sistemo de moveblaj literoj montrita ĉi tie estas tre efika.



Ideoj

Marĉa arabo [Arab al-Ahwār بزر او دال], kiu loĝas en tradicia domo, trinke gustumas freŝan bubalan lakton dum malvarma mateno, fotite fotita en marto 2017 en la marĉaj regionoj de Suda Irako. La bildo estas el la freŝdata serio La lasta Edeno de Irako: Mezopotamiaj marĉoj de la franca fotisto Emilienne MALFATTO.

© Emilienne Malfatto



Arkitekturaj lecionoj

por la estonteco, pere de la estinteco

Amin Al-Habaibeh

Modernaj urboj, kun siaj pavimaj vojoj kaj vitraj turoj, ne estas adaptitaj al la atendata plialtiĝo de temperaturoj. Projektitaj por provizi ombron kaj aeran cirkuladon, tradiciaj konstruaĵoj en la landoj de Mez-Oriento, Persa Golfo kaj Afriko povus inspiri pli daŭrigeblajn kaj mediprotektajn habitatojn en aliaj partoj de la mondo.

Kiel rezulto de tutmonda varmiĝo kaj la altiĝo de niveloj de forcejaj gasoj, urboj tra la mondo estas pli kaj pli verŝajne submetotaj al ekstremaj temperaturoj. Tio ĉi estas precipe ĝusta en la landoj de Persa Golfo, kie estas atendate, ke la temperaturoj altiĝos al pli ol 50°C dum la dudek unua jarcento. Sed tiuj ĉi varmegaj ondoj ne domaĝis aliajn regionojn de la mondo — precipe Eŭropon, kie dum la somero de 2019 rekordaj temperaturoj estis atingitaj en Francujo, Unuiĝinta Reĝlando kaj Svisujo, inter aliaj landoj.

Hodiaŭ, vivmanieroj kaj arkitekturo dependas de klimatizo kaj modernaj materialoj kiel betono, asfalto aŭ vitro. Tamen tiuj ĉi materialoj ne estas adaptitaj al altaj temperaturoj. Vitro reflektas sunan radiadon al la ĉirkaŭaĵo, kreante varmegajn insulojn kaj la riskon de forceja efiko en konstruaĵoj. Ankaŭ asfalto absorbas grandan parton de la sunaj radioj, kiujn ĝi turnas en varmofluon — tiel kontribuante al varmiĝo de la loka

vivmedio. Betono, aliflanke, konsumas multegan energion dum ĝia produktado, kio kontribuas al tutmonda varmiĝo per karbonaj eligoj. Aldone, moderna urba planado ne favoras publikan transportadon. Tio necesigas privatajn veturilojn, kreante pli da malpurigo kaj loke limigitaj varmegaj insuloj, precipe, kiam kombinite kun la klimatizaj sistemoj de konstruaĵoj.

Pasintece, antaŭ la alpreno de la moderna vivmaniero, plej multaj homoj sur la planedo vivis en pli harmonia maniero kun sia vivmedio. Ili aŭ estis kultivistoj ene de oazo, agrikulturaj aŭ

fiŝkaptaj vilaĝaj komunumoj, beduenoj, aŭ nomadoj, vivantaj en tendoj en la dezerto, aŭ urbaj loĝantoj, kiuj vivis en urboj.

La materialoj, kiujn oni elektis por konstrui siajn loĝejojn, venadis el la vivmedio. Ili estis daŭrigeblaj, adaptitaj al onia vivmaniero kaj bazitaj sur kio nun estas nomata cirkla ekonomio. Pro sia nomadanta vivmaniero kaj paŝtado de bestoj, la beduenoj vivis en tendoj, kiuj estis optimumigitaj por protekto kontraŭ vetero kaj por fleksebleco. La tendoj estis projektataj kaj konstruataj por efike funkcii en la vivmedio — oni teksis ilin uzante haveblajn rimedojn, kiel kapran vilaron kaj ŝafan lanon. Tial ili estas nomataj arabe “domoj faritaj el hararo”.

Tipa andaluzia patio [korto] en Kordovo, Hispanio.



© kelvinjayi/Stock/Getty Images Plus

“*Jordanio, la nabatea popolo prenis tiun simbiozon kun naturo eĉ pluen, uzante la termikan inercion de la grundo*”

Mediprotektaj materialoj

La materialo, el kiu estas farita la tendo, permesas al la aero cirkuladi. La fibroj ŝvelas kaj iĝas akvo-imunaj, kiam malsekaj, kio estas ideala dum pluva vetero. En la varmega kaj seka vetero, la beduenoj malsekigas la tendon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon kaj ankaŭ humidigas aldonajn pecojn de tuko kaj tapiŝetojn por redukti temperaturojn per akva vaporigo. La granda izola kapableco de la tendoj permesas teni ilin friskaj somere kaj varmaj vintre, helpe de fajreto. Nenio malhelpas nin uzi similajn materialojn por krei modernan arkitekturon, kaj fari temperaturojn pli tolereblaj.

Aliflanke, pasintecce oni projektis konstruaĵojn kun tre dikaj muroj, uzante naturajn kaj mediprotektajn materialojn kiel kalkoŝtonon kaj naturan koton, kiu estis miksitaj kun lokaj dezertaj plantoj en kelkaj okazoj. Tio disponigis konstruan materialon kun alta termika kapablo por reguligi la temperaturojn de la konstruaĵoj. La materialoj havis la avantaĝon absorbi humidecon dumnokte, kiu forvaporigis dum la varmegaj kaj sunaj tagoj, por provizi la bezonatan malvarmetigan efikon. Tiu ĉi efiko estas evidenta ĉe la Ruĝa Palaco en *Al-Jahra*, Kuvajto — bonega ekzemplo de la arkitektura kaj konstrua teknologioj, kiuj iam ekzistis en la regiono de Persa Golfo.

En varmaj klimatoj, urboj kaj konstruaĵoj estis projektataj por optimumigi ombbron, redukti la rektan kaj nerektan termikan pliiĝon de suna radiado, reguligi konstruaĵajn temperaturojn kaj pliiĝi aeran cirkuladon por malplivarmigo. La stratoj estis pavimitaj per naturaj ŝtonoj aŭ simple lasitaj kovritaj per sablo. Tio signifis, ke ili multe pli bone reagis al

altaj temperaturoj ol la asfalto hodiaŭe uzata. Pro la mallarĝaj vojoj kaj stratetoj kaj konstruaĵoj metitaj unu apud la alia, la proporcio de la areo submetita al la suno relative al la tuta volumeno de la konstruaĵoj estis reduktita al minimumo.

Preferi ombbron kaj aeron

Konstruaĵoj estis projektataj kun internaj kortoj ĉirkaŭitaj de ĉambroj aŭ muroj — en plej multaj okazoj, de ĉiuflanke. Tio kreis grandan areon por sociaj agadoj dum nokto kaj dum malfruaj posttagmezoj, pro la maksimumado de ombro ebligata de la ĉirkaŭaj ĉambroj. En plej multaj okazoj la centra korto enhavis arbojn kaj fontanon aŭ puton, uzatajn por kapti pluvo-akvon. Dum tagmezo, la korto funkciis kiel aertubo por ke la varmega aero leviĝu kaj estu anstataŭigata per pli malvarma aero el la ĉirkaŭaj ĉambroj, kio plibonigis aeran cirkuladon.

Tiu ĉi tipo de arkitekturo estis tre kutima en Damasko, Sirio, kaj en Andaluzio, Hispanujo. La mallarĝaj stratoj povis esti kovritaj per malpezaj materialoj el daktilarboj. Tio plibonigis aero-cirkuladon inter la stratoj kaj kortoj de la konstruaĵoj, pere de la ĉambroj. La teksturo kaj la sabla koloro de la muroj limigis la absorbon kaj eligon de la radianta varmego.

Vitro ne estis ordinara konstrumaterialo en la pasinteco. Iuj ĉambroj havis nur du fenestrojn. La unua estis eta fenestro en la tegmento, metita tre alte kaj ĉiam malfermita por aero-cirkulado kaj natura lumo, samtempe konservanta privatecon. La dua, pli granda, fenestro kutime estis fermita, kun lignaj ŝutroj, kiuj ebligis aerflon en la ĉambron, ankaŭ protektante privatecon.

La *maŝrabija* elstaranta fenestro kun skulptitaj lignaj latisoj, kutime trovata sur la supraj etaĝoj de konstruaĵoj, certigas pli bonan aero-cirkuladon kaj protektas

kontraŭ rekta submeto al la suno. Tio estis kutima trajto de konstruaĵoj en multaj regionoj de Mez-Oriento, inkluzive de Egiptujo, la regiono Heĝazo [*al-Hiĝāz*] en Sauda Arabujo kaj Irako — kie la fenestroj estas konataj kiel *rūšān* aŭ *šanšūl*. Kelkaj konstruaĵoj en Persa Golfo havis ventoturojn por krei naturan ventoladon, kie eblis malfermi kaj fermi la pordojn en la plafono, depende de la vento-direkto — ili funkciis simile al modernaj peraer-malvarmigaj sistemoj.

Aliaj trajtoj de konstruaĵoj estis altaj strukturoj kaj klostroj, por maksimumigi ombbron kaj plibonigi aero-cirkuladon.

Konstruita en 2011, la Lernejo pri Kudrado Ŝtalo-Tero en Niamey, Niĝero, kombinas la scipovon kaj lokajn materialojn kun nuntempaj teĥnologiej progresaj. La fortikeco de la strukturo, kiu uzas materialojn, inkludas banco, miksaĵon de grundo kaj pajlo kun bona termika inercio, estas certigita per duobla metala tegmento.



© photo: Gustave Deghulge/architect: Odile Vandenberghe

Ili ofte estis uzataj kun volboj, por pligrandigi la aero-volumenon interne, kaj malgrandigi eksteran plivarmiĝon. La ideo estis krei termikan diferencon, kiu kaŭzas malplivarmiĝan brizon, sendepende de la reala venta rapideco.

Simbiozo kun naturo

En Afriko, kabanoj el koto ankoraŭ estas konstruataj hodiaŭ. Laŭ daŭrigebla projekto kaj simpla, farataj per argilo kaj pajla tegmento, la kabanoj ne nur ebligas pasivan malvarmiĝon, sed ankaŭ estas rapide konstrueblaj, malmultekostaj kaj recikligeblaj. La samo validas pri la tradiciaj kanaj domoj farataj de la popolo *Ma'dān*, aŭ *Marĉaj araboj* [*Arab al-Ahwār*], de la marĉoj de Suda Irako - ilia unika konstruprojekto ebligas protekton per plibonigita aero-cirkulado.

CC BY-SA 2.0 photo: Dennis Jarvis



Hejmo de troglodito [loĝanto en kaverno] en Matmata, suda Tunizio.

En Petra [*Al-Batrā'*; greke: Πέτρα "ŝtono"], Jordanio, la nabatea popolo prenis tiun simbiozon kun naturo eĉ pluen, uzante la termikan inercion de la grundo. Ili kreis inĝenie planitajn urbojn, kun novigaj loĝejoj kaj kompetenta pluvoakva rikolta sistemo. La indiĝenaj loĝantoj utiligis la naturajn montojn en la regiono, tranĉante siajn loĝejojn en la monta deklivo. Tio certigis bone reguligitajn temperaturojn kaj somere kaj vintre — malkiel en modernaj konstruaĵoj, kie temperaturoj varias sezone.

Similajn strukturojn kaj konceptojn uzantajn la termikan inercion de la grundo oni ankaŭ povas trovi en Kapadocujo, Turkujo; la klifaj loĝejoj de la indiĝena amerika popolo *Sinagua* ĉe Kastelo Montezuma en Arizono, kaj la cavates, aŭ homfaritaj loĝkavoj, kaj vojetoj hakitaj el mola tofa roko ĉe *Tsankawi*, Nov-Meksiko — ambaŭ en Usono.

Unun el la plej fascinaj historiaj arkitekturaj konstruprojektoj, la subterajn trogloditajn loĝejojn, oni povas trovi en la berbera vilaĝo *Matmata*, en suda Tunizio. Konstruitaj per la elfosado de granda kavaĵo en la tero, kutime sur montetara loko, kavaĵoj, kiuj servas kiel ĉambroj, estas elfosataj el la centra kavaĵo, kiu fariĝas centra korto. Tiu ĉi konstruprojekto certigas bonegan termikan izoladon. Unu el la matmataj loĝejoj, nun turnita en hotelon, estas prezentita en la filmo de



1977, *Star Wars: Episode IV — A New Hope* [Interstelaj militoj: Epizodo IV — Nova espero], kiel la domo de Luke Skywalker sur la fikcia dezerta planedo, *Tatooine*.

Adaptante siajn vivmanierojn estis tamen alia maniero, per kiu homoj traktis ekstremajn veterajn kondiĉojn en la pasinteco. La labora tago komenciĝis ĵuse antaŭ mateniĝo, kaj homoj serĉis rifuĝon de la tagmeza suno ĝis malfrua posttagmezo — kiam ili daŭrigis siajn negocojn kaj komunuman interkomunikigon en pli malvarmaj temperaturoj. Tiu ĉi kulturo estas ĝis nun praktikata en Mez-Oriento kaj Hispanujo, kie siesta [posttagmeza ripozo, ofte dormetada] estas observata. Trinkebla akvo estas konservata en argilaj potoj aŭ akvo-sakoj faritaj el besta ledo, kaj tenata en la ombro. La vaporiga procezo kreas malvarmigan efikon kaj por la konservita akvo kaj la ĉirkaŭaĵoj.

Homoj sin vestis per vestaĵoj faritaj el naturaj materialoj — la lozaj fasonoj estis farataj por plibonigi malvarmigon kaj aero-cirkuladon, dum la vestaĵoj kovris la plejparton de la korpo por preventi sunbruliĝon. La kapoj kaj vizaĝoj kaj de viroj kaj de virinoj estis plej ofte protektataj per skarpoj — faritaj por redukti akvo-perdon pro spirado, filtri la aeron de polvo, protekti kontraŭ sunfrapo kaj preventi maljuniĝon de la haŭto. Tiu ĉi multutila teksaĵo estas konata per diversaj nomoj, depende de sekso, regiono kaj fasono.

Modernaj solvoj el tradiciaj konceptoj

Inkluzivi tradiciajn faraĵojn en modernan arkitekturon eble estas ankoraŭ unu solvo por pritrakti klimatan ŝanĝon. La uzo de tradicia arkitekturo bone funkciis por kelkaj modernaj konstruaĵoj, ekzemple, en Sevilo, Hispanujo. Akvo-fontano meze de korto ĉirkaŭata de arboj, kune kun la strukturo de kaj la konstruaĵo bone funkcias por redukti la temperaturon.

Masdaro, urba projekto en Abudabio [*Abū Zābi* [e'bu'ðʕabi]], Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj, provis kombini lecionojn el la pasinteco kun modernaj teknologioj — uzante *maŝrabijajn* fenestrojn, mallarĝajn stratojn kaj tradiciajn kolorojn.

Ankaŭ aliaj landoj de Persa Golfo laboras por projekti daŭrigeblajn ekologiajn konstruaĵojn. Daŭre esplorante kaj plibonigante konstruaĵajn kaj pavimajn materialojn, konstruaĵajn projektadon kaj urban planadon, izoladon kaj la uzon de renovigeblaj

energioj, urboj de Persa Golfo kaj aliaj landoj kun altaj temperaturoj povas daŭrigi siajn komfortajn vivmanierojn — kun konsiderinde malaltaj niveloj de karbonaj eligoj kaj uzo de fosiliaj brulaĵoj.

En Eŭropo, kie temperaturoj estas atendataj varii inter varmeĝo kaj malvarmeĝo en la estonteco, bona komenco estus pliigi la dikecon de muroj de konstruaĵoj per aldono de izolado kaj naturaj materialoj. Tio reduktus la bezonon por hejtado vintre kaj klimatizo somere.

Feliĉe, la altiĝo de temperaturoj ankaŭ permesas pliigon de renovigebla suna energio. En plej multaj domoj la uzo de lumelektra suna energio

kombinite kun pli bona izolado povus disponigi la bezonatan energion por funkciigi klimatizajn sistemojn. Sed tio kreas varmeĝo-insulojn sur la vojoj — precipe tiuj faritaj el asfalto, kiel nun estas. Planti pli da arboj helpus reguligi temperaturojn en tiuj ĉi kondiĉoj, kaj ebligi pli malvarmajn vivmediojn.

La uzo de naturaj aŭ novigaj materialoj, kiuj absorbas kondensajn kaj pliigas termikan kapablecon, povus reguligi plivarmiĝon kaj helpi la naturan malplivarmigan procezon. Inteligenta urba planado, kiu simulas malnovajn urbojn, povus fari la uzon de pura publika transportilaro pli realigebla opcio. Ĉar la temperaturo de marakvo estas pli reguligata ol la aero, anstataŭigi ekzistantajn klimatizajn sistemojn per



© Laurent Witr/Ancos/Saif images/courtesy of Foster + Partners

“ Dum jarcentoj, homoj projektadis konstruaĵojn por ke ili estu daŭrigeblaj, kiam temas pri hejtado kaj malplivarmiĝado, uzante inĝeniajn teknikojn kaj daŭrigeblajn materialojn, kiujn ili povis trovi en la loka vivmedio ”

Instituto pri Scienco kaj Teknologio kun ventoturo modernigata de la brita arĥitekta kompanio Foster + Partners en Masdaro, Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj. Ĉi tiu recikligita ŝtala strukturo, 45 metrojn alta kaj ekipita per disŝpruciloj, kio permesas redirekti la aerfluron por antaŭenigi freŝecon.



grandaj malplivarmiĝaj kaj hejtaj sistemoj laŭ la distrikta nivelo povus disponigi daŭrigeblan alternativon. La saman teknologion oni povus apliki al riverakvo kaj akvo el inunditaj karbominejoj.

Ekzistas multaj lecionoj lernendaj el tradiciaj konstruaĵoj ĉirkaŭ la mondo. Dum jarcentoj, homoj projektadis konstruaĵojn por ke ili estu daŭrigeblaj, kiam temas pri hejtado kaj malplivarmiĝado, uzante inĝeniajn teknikojn kaj daŭrigeblajn materialojn, kiujn ili povis trovi en la loka vivmedio. Se ni volas redukti tutmondan varmiĝon por estontaj generacioj, ni devas integri tiujn ĉi lecionojn kun niaj modernaj teknologioj por krei daŭrigeblajn kaj senkarbonajn urbojn.



Profesoro pri inteligentaj inĝenieraj sistemoj ĉe la Lernejo de Arkitekturo, Projektado kaj la Konstruita Vivmedio ĉe la Universitato *Nottingham Trent* en Unuiĝinta Reĝlando, **Amin Al-Habaibeh** (Unuiĝinta Reĝlando) ankaŭ estras esplorgrupon pri Novigaj kaj Daŭrigeblaj Tehnologioj por la konstrumedio [*Innovative and Sustainable Built Environment Technologies*] (iSBET).

El la angla lingvo tradukis Moradi Ali (Irano)



Nia gasto



90-jaraĝa, Nelly Minyersky estas la ĉefa figurino en la lukto de argentinaj virinoj kontraŭ seksa perforto kaj senkriminaligo de abortigo.

© Sebastián Hacher

Nelly Minyersky:

la verda reĝino

Intervjuo de
Lucía Iglesias Kuntz, Unesko

Per kampanjoj kontraŭ la seksa perforto kaj virinmurdoj, kiel #NiUnaMenos [#Neniun malpli], kaj ilia batalo por leĝigo kaj senpunigo de abortigo, argentinaraj virinoj trabatas al si novajn vojojn kaj transpasas landlimojn. Je sia 90-a jaraĝo, la juristo Nelly Minyersky estas unu el iliaj plej aktivaj modeloj. Tiom, ke ekzistas tiuj, kiuj baptis ŝin "la verda reĝino", pro la koloro de la tukoj, per kiuj sin identigas subtenantoj de libera kaj sekura abortigo, mallonge, de "leĝo por ne morti".

© Gala ABRAMOVIČI



Nelly Minyersky kun aktivuloj de la Nacia Kampanjo por la Laŭleĝa, Sekura kaj Senpaga Rajto je Abortigo, ekster la Kongreso de la Argentina Nacio la 13-an de junio 2018, dum debato pri la leĝo por legalizi abortigon.

Kiel estiĝis la nuntempa kampanjo por la rajto je abortigo en Argentino, en kiu vi aktivas?

La kampanjo por la rajto je abortigo estiĝis en 2005, sed ĝia origino estas en la Naciaj Virinaj Renkontiĝoj, kiuj naskiĝis en 1986, baldaŭ post la restarigo de la demokratio. La Renkontiĝoj estas forumoj por diskutado pri valoroj, principoj kaj formoj de organizo fare de kaj por virinoj, kiuj okazas ĉiujare en malsama urbo en la lando. Kiam ili komenciĝis, ĝin partoprenis ĉirkaŭ mil virinoj kaj nun la partoprenantaro estas pli ol 60 000. Estas du tagoj kaj duono, kiam la tuta aktivado rondiras ĉirkaŭ aferoj rilataj al seksaparteno, kun laborkunvenoj, teatraĵoj, metiaj foiroj, fakulaj diskutoj pri sano, mamnutrado, debatoj pri literaturo je la vidpunkto de aparteno al certa sekso ... Ĝi estas unika sperto, kiu kunigas malsamajn sociajn klasojn, en malsamaj aĝoj ... Mia opinio estas, ke ni, virinoj, havas ĉi tiun apartaĵon - estas pli facile por ni ol por viroj kuniĝi, eĉ se ĉiu el ni havas siajn politikajn ideojn. Oni kuniĝas kun municipaj dungitinoj kaj kun junaj lernejaninoj... kaj oni spiras

Kiel vi alvenis al feminismo? Ĉu vi havis modelojn?

Mi mensogus, se mi mencias al vi nomojn de grandaj figuroj. Miaj modeloj estis sendependaj virinoj. Laŭ mia scio, virinoj en la familio de mia edzo ĉiuj estis profesiulinoj: ĥemiistinoj, instruistinoj de la franca... Mi ĉiam estis ĉirkaŭata de progresemaĵoj homoj. Mi sukcese studis juron kaj interesiĝis pri feminismo kiel parto de homaj rajtoj ĝenerale, ĉar mi travivis plurajn diktaturojn. Mi specialiĝis pri Familia Juro kaj komencis rimarki, ke la jura malkapablo de virinoj efektive koncernas edziniĝintajn virinojn. Fraŭlinoj havis tre malmultajn limojn kaj ĝuis preskaŭ ĉiujn rajtojn. Aliflanke, pro la ekonomia modelo kaj la klopodo konservi familian enspezon, edziniĝintaj virinoj estis multe pli limigitaj. Kiam mi interesiĝis pri kiel ŝanĝi la aferojn, mi interesiĝis pri feminismo.

De kie venas via engaĝiĝo por homaj rajtoj?

Mia patro elmigris al Argentino en la aĝo de 23 jaroj el Besarabio (hodiaŭa Moldavio). Li havis sian tutan familion en Eŭropo, do ni travivis la Duan Mondmiliton tre intense. Mi memoras aŭdi la voĉon de Hitler en radio, tiu ponardanta voĉo estis tre malfacila afero, kiu lasis sian spuron en mi kaj sendube inklinigis min fari tion, kion mi faras.



*“Leĝan, sekuran kaj senpagan abortigon”.
Desegnaĵo de la argentina artisto Andi Landoni, parte de la kampanjo Linea Peluda [Hara Linio] por leĝigo de aborto.*

© Andi Landoni

ĝojon. La Renkontiĝoj ankaŭ estas plurismaj, tiel ke nun oni volas ŝanĝi ilian nomon al “Plurnaciaj Renkontiĝoj” por gastigi niajn indiĝenajn popolojn.

La Oficejo de Unuiĝintaj Nacioj pri Narkotaĵoj kaj Krimo [United Nations Office on Drugs and Crime] (UNODC) taksas, ke pli ol 50 000 virinoj tutmonde estas viktimoj de virinmurdo ĉiujare. Kiel trakti ĉi tiun problemon?

Mi havas teorion, kvankam mi kredas, ke mi neniam profundigos en ĝin. Tio estas, ke virinmurdoj malaperos, kiam progresos integra seksa edukado. La pruvo estas, ke en ĉiuj landoj, kie oni serioze ricevas tian edukadon de tre juna aĝo, la indicoj de murdoj pro seksa perforto estas pli malaltaj. En multaj el niaj landoj ni devos ankoraŭ atendi jarojn por atingi tion.

Kial Argentino, kiu havas leĝon pri edz(in)iĝo de samseksaj homoj kaj alian permesantan libere elekti la propran seksan identecon, havas neniun leĝon pri abortigo?

Estas vere, ke en la lastaj jaroj en Argentino oni aprobistujn kaj multajn aliajn leĝojn donantajn multajn rajtojn al virinoj: leĝon pri integra protektado, la Nedevisa Protokolo de la Konvencio pri Forigo de Ĉiuj Formoj de Diskriminacio kontraŭ Virinoj, emeritiĝo de dommastrinoj... Mia teorio estas, ke edz(in)iĝo inter samseksaj homoj signifas finfine enigi grupon de homoj en modelan institucion, submeti ilin al socia regado. Sed, male, abortigo ne akordas kun la dezirata modelo, ĝi estas tute perturba. Kaj sendube ĝi estas ankaŭ unu el la plej fortaj bastionoj de patriarkeco.

Vi estas unu el la redaktintoj de la leĝprojekto pri senpunigo de abortigo, kiun la Ĉambro de Deputitoj de la Kongreso de la Argentina Nacio aprobis en junio 2018, sed kiu du monatojn poste ne sukcesis ricevi aprobon de la Senato. En kio konsistas tiu projekto?

La devizo de nia Kampanjo estas “Seksa edukado por decidi, kontraŭkoncipiloj por ne abortigi, laŭleĝa abortigo por ne morti”.

Tiuj ĉi tri principoj montras, ke ekzistas solvoj. Kaj nia projekto pledas por la senpunigo de abortigo, sed ankaŭ por ĝia laŭleĝigo. La leĝo, kiu punas abortigon, estas diskriminacia leĝo, ĉar la virinoj, kiuj mortas, la knabinoj gravedaj kaj devigataj patriniĝi, estas la virinoj kaj knabinoj apartenantaj al la plej marĝenigitaj kaj vundeblaj sociaj klasoj. Se oni ne laŭleĝigas abortigon per simpla senpunigo, tiuj klasoj ne havos la eblon havi la rajton je inda kaj sekura sanservo. Inter la jaroj 2007 kaj 2018 estis en Argentino sep provoj prezenti leĝprojekton pri rajto je abortigo, kaj baldaŭ estos prezentita la oka. Sed dume, la Kampanjo, kiu estas movado konsistanta el pli ol 500 organizaĵoj, insistas kaj daŭre laboras en ĉi tiu temaro, ĉar ni konsideras ĝin esenca, kaj la rajton je abortigo oni konsideras kaj transdonas kiel unu el la fundamentaj homrajtoj.

Kian reeĥon havis ĉi tiu leĝprojekto?

Kiam en 2018 finfine oni ebligis la debaton en la Ĉambroj de la Parlamento, okazis unika fenomeno, epopea situacio: ni sukcesis pri la subteno de unu miliono kaj duono aŭ du milionoj da junaj knabinoj surstrate, ni sukcesis, ke oni invitu nin prelegi en mezlernejoj, kie respekteme gejunuloj demandis, ĉu mi abortigis... Oni okazigis debatojn sen skandaliĝo, ni vekis kaj transdonis – jen la plej kortuŝa afero – mesaĝon, kiu iris multe preter abortigo, mesaĝon pri libereco, pri aŭtonomeco... Estas kortuŝe vidi knabinojn, gejunulojn, virojn kun la verda tuko, kiu estas la insigno de la subtenantoj de la leĝo. Tiel ni sukcesis pri io, kion ni eĉ ne prirevis: la interakordo inter deputitinoj el malsamaj politikaj partioj, kiuj, kune, sukcesis aprobi la leĝon en la Deputita Ĉambro, kion en Argentino ni nomas “duona sankcio”. Tio estis io mirinda, tute neatendita.

Tamen ĝis nun la leĝo ne estas aprobita...

La leĝo estis malakceptita ĉe la Senato, sed malvenki nur per sep voĉoj (38 kontraŭaj voĉoj kaj 31 poraj voĉoj) estis por ni granda triumfo. Ni ne malvenkis. Ni ne havas la leĝon, sed la historio estas ŝanĝiĝanta. Oni forkondukis abortigon de la nigra zono, de la delikta zono en la mondrigardo de la socio, oni ĝin maldemonigis, kaj nun oni parolas pri la seksaj kaj reproduktaj rajtoj, gejunuloj priparolas ĝin. En tio ni multege progresis.

Kaj ni breĉis al ni vojon, ĉar ni nune sukcesas pri ŝanĝo en la socia konscio. Ni sukcesis varbi geadoleskantojn kaj gejunulojn, kiuj nun rigardas abortigon kiel homrajton. Kaj aliajn tre ampleksajn homgrupojn, ĉar starigis ankaŭ retoj de profesiuloj, de kuracistoj, de flegistinoj, de advokatinoj... Vera verda tajdo.

Post tiom da jardekoj da laboro kaj aktivado, kiel vi rigardas feminismon mondscale?

Sendube la popolaj movadoj sukcesis progresigi la feminisman movadon. Sed tiu progreso ankaŭ estigis reagon, iom latentan, sed daŭre efikantan ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj forumoj. Ekzistas antaŭnelonga raporto de la Observejo pri la Universaleco de la Homaj Rajtoj titolita "Endanĝerigitaj Homrajtoj", kiu tre bone evidencigas, kiel la plej ekstremismaj adeptoj de pluraj religioj alianciĝas kun la plej konservativaj sektoroj por provi regresi, en priseksaj aferoj, al la

epoko antaŭa al la Pekina Konferenco (1995), kiu markis turniĝon en la lukto por la seksa egaleco. Tie estis enkondukita ekzemple la esprimo "priseksa ideologio". Ĝi estas movado progresanta tagon post tago kaj, parenteze, kondamnanta UNICEFon aŭ Unesko-n pri disvastigo de tiu tiel nomata ideologio. Ni devas teni nin singardaj.



*El la hispana lingvo tradukis **Pablo León** (Argentino)*

Naskiĝinta en San Miguel de Tucumán (en la nordokcidento de Argentino), en 1929, **Nelly Minyersky** estas unu el la plej elstaraj aktivuloj por virinaj rajtoj en Argentino. En 2010 ŝi estis nomumita Eminentia Civitano de la urbo Bonaero. Ekde 2017, ŝi prezidas la Virinan Parlamenton. En la sindikata medio, ŝia agado igis ŝin fariĝi la unua virino, kiu prezidis la Bonaeran Asocion de Advokatoj kaj ankaŭ la unua prezidantino de la Disciplina Tribunalo de la Publika Kolegio de Advokatoj de Bonaero..



“Mi interesiĝis pri feminismo kiel parto de homaj rajtoj ĝenerale, ĉar mi travivis plurajn diktaturojn”

“Vi ne estas sola”. Desegnaĵo de la argentina artisto Lucia Seisas, parte de la kampanjo Linea Peluda [Hara Linio] por leĝigo de aborto.

© Lucia Seisas



Aktualaĵoj

Dum tri tagoj ĉiujare en junio, la loĝantoj de la distrikto Quehue partoprenas centjaran riton: la restarigon de la ŝnura ponto Q'eswachaka, kiu etendiĝas super la rivero Apurímac.

© Jordi Busqué



Inkaa *pendanta* *ponto* restaŭrita en Peruo

Jordi Busqué, fotojurnalisto en Sud-Ameriko

Ĉiujare en la unua semajno de junio, la loĝantoj de la *Quehue*-distrikto en Peruo kuniĝas por restaŭri la ŝnurajn pendantajn pontojn, kiu kunigas la du bordojn de la rivero *Apurímac*. Ĉi tiu jarcentojn longa Anda tradicio estas enskribita en la Reprezenta Listo de la Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro ekde 2013.

Ĉi tiu artikolo estas publikigata okaze de la 14-a sesio de la Interregistara Komitato por la Konservado de la Nemateria Kultura Heredaĵo, okazanta de la 9-a ĝis la 14-a de decembro en Bogoto, Kolombio.

Necesas proksimume ok horoj da singarda stirado ĉe la turniĝantaj stratoj por atingi *Quehue* venante de *Cusco*. En la unua semajno de junio 2019, kiam finiĝas la pluvsezono, ĉi tiu vilaĝo, situanta en Sudaj Andoj en Peruo, spertas vere specialan momenton. Kiel estas kutime dum tiu ĉi tempo ĉiujare, la loĝantoj partoprenas en jarcentojn malnova rito daŭranta tri tagojn: la restaŭrado de la ŝnura pendanta ponto *Q'eswachaka* [keĉue q' eswe 'tʃɛkə aŭ q' eswe 'tʃɛkə].

Ĉi tiu ponto estas konstruita super la interkrutejo de la rivero *Apurímac* (kio signifas "orakolo de la dio de la montoj" en la keĉua lingvo). Ĝi kunigas la komunumojn *Huinchiri*, *Chaupibanda* kaj *Chocayhua*, kiuj vivas sur la maldekstra bordo, kun la komunumo *Qollana Quehue* sur la dekstra bordo. Ĝi estas la laste restinta ponto farita el vegetalaj fibroj en Peruo. Simbolo de la ligo inter la loĝantoj kaj naturo, iliaj tradicioj kaj ilia historio, *Q'eswachaka* estas konsiderata sakrala.

Kelke da tagoj antaŭ ol la rito komenciĝas, la loĝantoj falĉas *q'oya*, fortikan herbon kreskantan en la humidaj altebenaĵoj de Andoj. Ĝi estas poste tordata kaj streĉata por formi *q'eswa*, longan ŝnuron. La vilaĝanoj lernas kiel plekti la fibrojn ekde frua aĝo. Sidante ĉe promenejo en la vilaĝo, virino plektas unu



© Jordi Busqué

Kelke da tagoj antaŭ ol la rito ekas, la loĝantoj tranĉas q'oya, specialan fortikan herbon, kiu kreskas en la altaj Andaj areoj, kaj tordas ĝin por formi longajn ŝnurojn. Ili lernas kiel plekti ĉi tiujn ŝnurojn de frua aĝo.

el ĉi tiuj ŝnuroj kun mirinda lerteco. Alia batas la herbon per rinda ŝtono kaj poste trempas ĝin en akvon el la rivero por igi ĝin pli fleksebla. Ĉio devas esti preta por la posta tago, kiam la rekonstruado de la ponto komenciĝas.

Rimarkinda reto de stratoj

La konstruaĵo, kiu utiligas teknikon 600 jarojn malnovan, estas atestanto pri unu el la plej rimarkindaj atingoj de la Inkaa civilizacio. Ili konstruis reton de stratoj – la *Qhapaq Ñan* – por kunligi siajn vastajn teritoriojn. Ili povis tion atingi nur defiante la malebenan geografion de Peruo, traŭrata de la profundaj interkrutejoj kaj

kanjonoj formitaj de la riveroj. Ĉar la lando havas relative altan sisman aktivadon, la fleksebleco liverata de ŝnuraj pendantaj pontoj estis avantaĝo. La malavantaĝo estis, ke ĉi tiuj pontoj estis malpli rezistaj al malbona vetero ol pontoj el ŝtono. En klimato, kie pluvas daŭre preskaŭ ĉiutage dum pluraj monatoj, la ŝnuroj fine difektiĝas, kaj la pontoj devas esti periode rekonstruataj. Kvankam la ponto ne plu estas la nura vojo kunliganta la du bordojn de *Apurímac*, la tradicio daŭras jaron post jaro.

Dum la unua tago de la rekonstruo, la viroj kuniĝas ĉirkaŭ la malnova ponto kaj plektas la pli malgrandajn ŝnurojn – plektitajn de la virinoj – en pli dikajn. La ĉefo de ĉiu familio alportas unu *q'eswa*, ĉirkaŭ sepdek metrojn longan. La vojoj, kondukantaj al la ponto, estas plenplenaj de motorcikloj ŝarĝitaj per ŝnuroj.



En la tria tago de la rito, viroj ambaŭflanke de la ponto fiksas la lastajn ŝnurojn, kiuj konsistigas la kontraŭfalgajn mantenojn.

Tradicia mastro de la ceremonioj, nomata *paqo*, prezentas oferojn al la *apus*, la spiritoj de la montoj, pri kiuj oni kredas, ke ili protektas la lokanojn. Malgranda altaro, sur kiu estas metitaj fetoj de lamoj, spikoj de tritiko kaj aliaj ritaj objektoj, estas starigita apud la ponto. La pliaĝuloj, rolantaj kiel tradiciaj pastroj, proponas alkoholaĵon al la viroj partoprenantaj la rekonstruon. Ŝafo estas oferbuĉata al la *apus*, kaj ĝia koro estas bruligata en malgranda fajro, kiun oni daŭre flamigas ĉe la bazo de la ponto. La pastroj volas esti certaj, ke la laborantoj estas protektataj de la dioj kaj ke neniu akcidento okazas dum la rekonstruado.

La ŝnuroj estas fiksataj la duan tagon, kiam la malnova ponto estas dekroĉita kaj falas en la riveron, kie ĝi estas forportata de la fluo kaj flosas for. Ĝi simple malkomponiĝas, ĝi ja konsistas nur el herbo. La tradicio diktas, ke nur al viroj estas permesate labori ĉe la efektiva rekonstruo. Virinoj restas ĉe la supra parto de la interkrutejo, plektante la pli malgrandajn

ŝnurojn. La ĉefa subteno de la ponto venas el ses grandaj trifoje falditaj ŝnuroj, ĉiu dika ĉirkaŭ unu futon, farita el ĉ. 120 pli maldikaj ŝnuroj. Kvar el la grandaj ŝnuroj konsistigas la plankon de la ponto, dum la aliaj du utilos kiel mantenoj. Ĉiuj ses ŝnuroj estas sekure alhokitaj al la grandaj ankroj el ĉizita ŝtono, ĉe ambaŭ flankoj de la kanjono.

Antaŭkolumba tradicio de komunuma laborado

La donado de la necesa tensio al ĉi tiuj pezaj ŝnuroj, nur pere de la homa tirado, forprenas la plejparton de la dua tago. La tirado estas farata ritme, laŭ la instrukcioj de la gvidaj arkitektoj. La diversaj stadioj de la konstruado estas superrigardataj de la pliaĝuloj kaj de du *chakaruaq*, fakaj laboristoj, kies plektaj teknikoj estas transdonataj de generacio al generacio. Tiu rekonstruo uzas *minka*, antaŭkolumban tradicion de la servoj

de la komunumo, konsistantan el Andaj farmistoj plenumantaj gravan taskon, kies profitoj estas kundividataj de la tuta komunumo.

La trian tagon, eta aro da viroj kiuj maltimas la altecon, paŝas laŭlonge de la strukturo, alligante malgrandajn ŝnurojn de la mantenoj al la planko de la ponto. Tio ebligas al ĉiuj trairi la ponton sekure. Du grupoj startas de ĉiu el la flankoj de la ponto, kaj fine renkontiĝas en la centro. Kiam la lasta ŝnuro estas en sia loko kaj la ponto estas fine preta, la laboristoj levas siajn manojn, kio kaŭzas, ke la homamaso jubilas laŭte.

La laboristoj estas la unuaj uzi la novan ponton, sed ĉiu avidas ilin imiti. Por sekureco, estas malpermesate, ke pli ol kvar personoj samtempe uzu la strukturon. La homamaso estas granda, kaj necesas longa tempo antaŭ ol ĉiu transiras la interkrutejon. Neniu moderna materialo, iloj aŭ maŝinoj estas uzataj dum la tuta rekonstruado de la ponto – nur ŝnuroj el herbo kaj homa forto.



“ Simbolo de la ligo inter la loĝantoj kaj naturo, iliaj tradicioj kaj ilia historio, Q'eswachaka estas konsiderata sakrala ”



La jara rekonstrua rito finiĝas per festoj, en kiuj ĉiuj loĝantoj partoprenas. Estas starigata scenejo, kaj muzika grupo ludas tradiciajn kanzonojn de la regiono. Lernejoj el la ĉirkaŭaj vilaĝoj partoprenas en danckonkurso. Ene de kelke da jaroj estos ĉi tiuj geknaboj, kiuj transprenos la rekonstruon de la pendanta ponto Q'eswachaka.



El la angla lingvo tradukis **Carlo Minnaja** (Italujo)

Ne pli ol kvar homoj rajtas esti sur la ponto samtempe.

© Jordi Busqué

El la holdoj de *Clotilda* al Africatown

Sylviane A. Diouf

En majo 2019, la novaĵo, ke arkeologoj malkovris la ŝipvrakon de *Clotilda* [klə'tɪldə] — la lasta registrita sklavŝipo, kiu direktiĝis al Usono, kvindek du jarojn post la leĝa malpermeso de la internacia sklavkomercado — aperis ĉefa en amaskomunikiloj tutmonde. Tamen la tuta atento fokusiĝis sur la posedanto de la ŝipo, ĝia kapitano kaj sur la ŝipo mem, anstataŭ sur la viktimoj de tiu abomena vojaĝo.

Ĉio komenciĝis en la jaro 1859 en la urbo *Mobile* [moʊ'bi:l], Alabamo, kiam la farmisto kaj kapitano Timothy Meaher ['tɪməθi 'mi: hə] vetis, ke li kapablos alporti “ŝipon plenan da nigrulaĉoj” rekte sub la nazoj de la aŭtoritatoj. Ĝis tiam, la komercado per sklavoj por venigi ilin al Usono — kiu laŭleĝe estis malpermesita ekde la 1-a de Januaro 1808 — povis esti farata nur kontraŭleĝe. Deliktintoj riskis la mortpunon. Malgraŭ tio, la ŝakrado daŭris senĉese, kaj petoj por remalfermi la sklavokomercadon kreskis ekde la 1840-aj jaroj.

Pro manko de laborantoj por la kreskantaj kotonaj kaj sukerkanaj plantejoj, sklavposedantoj en la sub-regiono *Deep South* [Profunda Sudo] devis aĉeti sklavigitajn laboristojn de la *Upper South* [Supra Sudo], kontraŭ prezoj, kiujn ili konsideris troegaj. Viro, vendita en Virginio, povis atingi prezon de 50 mil dolaroj, dum kontrabandita afrikano aĉetebis kontraŭ 14 mil dolaroj. Meaher dungis kaj financis William Foster, la konstruiston kaj posedanton de *Clotilda*. Kiel kapitano de improvizita sklavoŝipo, Foster alvenis en *Ouidah*, en la Reĝlando Dahomejo, la 15-an de majo 1860.

La terura travivaĵo de la 110 infanoj kaj junaj plenkreskuloj — duono da ili viroj, duono virinoj — kiuj iĝis la kaptitoj en *Clotilda*, komenciĝis kelkajn semajnojn pli frue. Post sangverŝa razio kontraŭ urbeto

farita de la armeo de Dahomejo, aro da postvivintoj estis alportitaj al *Ouidah*. Inter ili estis la 19-aĝa Oluale Kossola, kiu poste estis renomita Cudjoe Kazoola Lewis ['kʊdʒoʊ kə'zu:lə lu:ɪs]. Aliaj, inkluzive de grupo de komercistoj, estis forkaptitaj.

La kaptitoj devenis de malsamaj lokoj de Benino kaj Niĝerio, inkluzive *Atakora*, *Banté*, *Bornu* kaj Dahomejo. Ili apartenis al la etnaj grupoj de joruboj, iŝaoj [*Isha*], nupeoj [*Nupé*], *Dendi*, *Fon*, haŭsoj kaj *Shamba*. Inter ili estis islamanoj kaj iniciitoj el la societo *Oro*, aŭ Orisha-konventoj. Ĉiuj el ili estis brutale forkaptitaj de siaj familioj kaj komunumoj, kaj malliberigitaj en sklavokaĝoj, post kiam Foster elektis ilin el centoj da kaptitoj.

Kiam Ar-Zuma, Oroh, Adissa, Kupollee, Oluale, Abache, Omolabi, Sakaru, Jabar kaj iliaj kunuloj enpaŝis la ŝipon *Clotilda*, iliaj vestaĵoj estis forprenitaj, kiel estis kutimo sur sklavoŝipoj. La humiligo kaj la sufero, kiujn ili travivis, estis tiaj, ke eĉ kvindek jarojn poste, ili ne kapablis paroli pri tio — escepte pri la fakto, ke ili tre soifis, kaj ke du homoj mortis.

Kaŝita en la marĉo

La 8-an de julio 1860, post kvardek kvin tagoj surmare, la kaptitoj alvenis en *Mobile*, kaŝate de la nokto. Por forigi ĉiun spuron de la albordiĝo, *Clotilda* estis



©Equal Justice Initiative/Human Pictures. [Iniciato Justo por ĉiuj/Bildoj de homoj]

Detalo de skulptaĵo de la ganaa artisto Kwame Akoto-Bamfo dediĉita al la memoro pri la transatlantika sklavkomercado — ĝi estas ekspoziciita ĉe la Nacia Memorialo por Paco kaj Justeco en Montgomery, Alabamo.

“Ili neniam perdis sian
profunde enradikiĝintan
senton de aparteneco al
siaj malproksimaj lando kaj
popolo”



ekbruligita. Tamen, novaĵoj pri la “sekreta” alveno disvastiĝis tra la tuta lando, de la okcidenta marbordo al la orienta. La federacia registaro estis devigita interveni, kaj estis sendita teamo por serĉi la junajn afrikanojn. Ili estis kaŝitaj en la marĉo, tute nudaj dum kelkaj tagoj, ĝis kiam kelkaj ĉifonoj kaj feloj estis disdonitaj al ili post kiam ili estis trovitaj. Oni diskrete organizis vendon, kaj la grupo travivis alian korŝiran dispartigon. Ĉar kelkaj el ili iris al malproksimaj lokoj, ili ĉiuj kantis adiaŭan kanton, dezirante unu al la alia sekuran vojaĝon. Ĉirkaŭ sepdek ses homoj estis

dividitaj inter Meaher kaj liaj du fratoj, kaj Foster.

La procesoj kontraŭ la sklavo-posedantoj estis finfine ĉesigitaj, kaj la “ŝipkamaradoj” — kiel nomis unu la alian tiuj afrikanoj, kiuj kunvojaĝis sur la sama sklavoŝipo — estis dungitaj, malkaŝe, por labori sur vaporŝipoj, en la kampoj, kaj kiel servistoj. Ili estis firma komunumo de amikoj, kaj estis konataj pri tio, ke ili neniam toleris brutalecon kontraŭ si — ili kontraŭstaris aŭtoritatojn kaj ne timis la sekvojn. Afrik-usonano, sklavigita en la sama plantejo kiel kelkaj de la novalvenintoj, rakontis, ke iam, kiam

inspektisto provis vipi unu el la virinoj, ili ĉiuj saltis sur lin kaj bategis lin. Kiam kuiristo vangofrapis junan virinon, ŝi kriis. Ŝiaj kamaradoj alkuris ŝin por ŝin helpi, kun iloj enmane, kaj frapegis la pordon de la dormoĉambro de s-ino Meaher, kien fuĝis la kuiristo. Ofte mokataj de siaj sklavigitaj kamaradoj naskitaj en Usono, la pasaĝeroj de *Clotilda* tenis sin aparte de la aliaj kaj plu konservis la fidelecon al siaj propraj kulturoj — inkluzive siajn funebrajn ritojn.

En aprilo 1865, je la fino de la Enlanda Milito, la ŝip-kamaradoj liberiĝis. Sed tio ne estis tia libereco, pri kiu ili sopiris. Ili deziris reveni hejmen. Ossa Keeby, unu el ili, diris: “Mi iras hejmen al Afriko ĉiunokte en miaj sonĝoj.” La viroj trovis laboron ĉe segejoj kaj pulvomueliloj. La virinoj, kiuj estis mem-dungitaj, perlaboris siajn vivrimedojn per ĝardenumado kaj per vendado de siaj produktoj kaj de la korboj, kiujn la viroj plektis dumnokte. Ili konservis sian monon por pagi la kostojn de siaj hejmvojaĝoj. Kiam ili komprenis, ke ili neniam gajnos sufiĉe, ili sendis Cudjoe Lewis por peti de Meaher iom da tero. Ili argumentis, ke ili havas familiojn, hejmojn kaj teron antaŭ ol li perforte venigis ilin al *Mobile* kaj peze laborigis ilin kontraŭ neniun pago dum kvin jaroj. Meaher rifuzis.

Africatown

Duobligante siajn klopodojn, la ŝipkamaradoj kolektis sufiĉe da mono por aĉeti terpecojn de la familio Meaher kaj de aliaj lokaj terposedantoj. Ĉirkaŭ 1870, ili establis malgrandan vilaĝon en Alabamo, kiun ili fiere nomis *African town* [Afrika Setlejo], poste renomita *Africatown*.

Estis klara maniero montri, kiuj ili estas, kiuj ili volas resti, kaj kie ili volas resti. Por administri sian setlejon, ili elektis estron, nomatan Gumpa, kiu estis nobelo de Dahomejo, kaj du juĝistojn. Ili konstruis la unuan preĝejon kaj la unuan lernejon en la regiono, kaj kelkaj el ili lernis legi kaj skribi. Ili ankaŭ restis en kontakto kun la ŝipkamaradoj, el kiuj kelkaj loĝis en foraj distriktoj. Ĉar kelkaj el ili geedziĝis ene kaj foje ekster sia grupo, naskiĝis dua generacio. Al ili oni donis po unu usonan kaj po unu afrikan nomojn. Ĉi tiuj infanoj eksciis pri siaj originoj — iuj flue parolis sian gepatran lingvon kaj eĉ agadis kiel tradukistoj. La ŝipkamaradoj parolis ameme pri siaj hejmurboj — kiu fariĝis paradizo, rifuĝejo — por la infano — kien ili povis iri en siaj sonĝoj, kiam blanka rasismo kaj nigrula primokado fariĝis tro malfacile elportebblaj.

Ne cedinte dum ili estis sklavigitaj, la homoj de *Africatown* daŭre batalis por siaj rajtoj. Kiam la viroj decidis voĉdoni en la



Cudjoe [Kazoola] Lewis (1841-1935) estis unu el la fondintoj de Africatown [Afrika setlejo], vilaĝo kreita en 1870 de la homoj, kiuj estis alportitaj kiel skavoj al Alabamo sur la skuno Clotilda

elektoj de 1874, la furioza Meaher blokis ilian vojon. Nefortimigitaj, la viroj marŝis de balotejo al balotejo kaj fine sukcesis baloti. Kohenco, kiu mastrumis laktan farmon kun sia usona edzo, fariĝis membro de la unua movado por kontribucio, kiu klopodis por pensioj por liberigitaj homoj. En 1902, Lewis estis vundita per trajno kaj procesis kontraŭ unu el la plej grandaj korporacioj en la Sudo. Malgraŭ ĉio, tuteblankula ĵurio aljuĝis al li \$13 000, sed la juĝon nuligis la Supera Kortumo de Alabamo. Ankaŭ Gumpa, vundita per la trajno, procesis, sed li mortis antaŭ ol la kazo iris al tribunalo. Tamen, tamen, lia plendo estis kontentigita per malgranda monsumo pagita al liaj nepoj.

Kiam la ŝipaj kamaradoj estis intervuataj, ekde la 1890-aj jaroj, ili sisteme rifuzis bagateligi siajn iamajn religiojn, aŭ kritiki poligamion. Ili ankaŭ rifuzis kondamni tiujn, kiuj estis malliberigitaj ilin, atribuante sian sorton al "malbona sorto". Ili pacience, kaj foje senespere, klarigis kaj defendis siajn kulturojn. Demandite, ĉu ili preferas la urbon Mobile aŭ siajn iamajn hejmojn, ili ĉiam kaj senŝancele elektis la lastan.

La lastaj pluivantoj de Clotilda

Kiam Emma Langdon Roche, instruistino, diris al la lastaj pluivantoj el Africatown, kiuj nun estas aĝaj pli ol 70 jarojn, ke ŝi volas skribi pri iliaj vivoj, ili petis esti nomataj laŭ iliaj originaj nomoj — tiel, ke se la rakonto atingos ilian hejmon, iliaj parencoj scios, ke ili plu vivas. La libro, kun iliaj fotoj faritaj kvindek kvar jarojn post kiam oni ilin brutalece forpelis el iliaj loĝlokoj, estis publikigita en 1914. La aŭtoro Zora Neale Hurston ankaŭ intervjuis Lewis kaj filmis lin en 1928. Cudjoe Lewis, kiu perdis sian edzinon, Abile, kaj siajn ses infanojn en rapida sinsekvo, estis la lasta postvivanto de *Africatown*. Li forpasis en 1935, aĝa 94 jarojn, kaj estis la antaŭlasta konata postvivanto de la trans-Atlantika sklavokomercio. Du jarojn poste, Redoshi, virino kaptita en la sama razia atako, mortis en Dallas. Ankaŭ ŝi estis fotita, intervjuita kaj filmita.

“Ili faris laŭpove
ĉion por certigi,
ke iliaj rakontoj
estu registritaj,
kundiividitaj kaj
memorigitaj”



La ŝipkamaradoj de Clotilda vivis en Alabamotiomkiom ilipovis laŭsiaj propraj moroj. Sed malgraŭ sia intenca izoliteco, ili partoprenis en serio da eventoj, signifaj tiutempe. Ili tamen neniam perdis sian profunde enradikiĝintan senton de aparteneco al siaj malproksimaj lando kaj popolo. Hodiaŭ, la Africatown, kiun ili kreis kiel alternativon, daŭre estas hejmo por kelkaj el iliaj posteuloj. Sed ĉi tiu iam vigla komunumo nun travivas malfacilajn tempojn. Poluantaj paperfabrikoj, stratoj blokita per fabrikaj muroj, vojoj tratranĉantaj la kvartalon — media rasismo ruinigis la lokon. Nur Unia Baptista Misiista Preĝejo [Union Missionary Baptist Church] kaj la tombejo kun la praulaj tomboj estas palpeblaj memorigiloj pri la unua generacio. La loĝantoj esperas, ke la malkovro de Clotilda instigos turismon kaj rezultigos multe bezonatan reviviĝon de Africatown kaj ĝia fascina historio.

La ŝipvrako de Clotilda, kaj kion ajn ĝi malkaŝas, estas nur malhonora simbolo de la bazo por la ekonomia disvolviĝo de Usono. Pli grava estas la historio de la sperto de la gejunuloj, kiuj perdis ĉion, sed superis siajn terurajn cirkonstancojn. Per la severaj travivaĵoj de la sklavsipa navigado trans la Atlantiko de Afriko al Ameriko, sklaveco, la Enlanda Milito, Jim Crow [kies ŝtataj kaj lokaj leĝoj trudis rasan apartigon en la Sudaj Ŝtatoj de Usono], kaj parte de la Granda Depresio de 1929, ili retenis sian dignon, sian memfidon kaj siajn kapablojn, sian unuecon, sian senton de familio kaj sian fieron pri siaj kulturoj. Krome, ili faris ĉion, kion ili povis, por certigi, ke iliaj

La tombejo de la unuaj sklavoj, kiuj alvenis sur la skuno Clotilda, kaj iliaj posteuloj, en Africatown [Afrika setlejo]. Videble neglektataj, iuj tomboj malaperas en la tero.

rakontoj estu registritaj, kundividitaj kaj memorigitaj de la venontaj generacioj. Estas ilia terura rakonto pri perdo kaj malfeliĉo, sed ankaŭ pri triumfo super malfeliĉo — rakonto pri ignoritaj herooj.



Historiistino de la afrika diasporo, **Sylviane A. Diouf** estas la aŭtoro de *Dreams of Africa in Alabama: The Slave Ship Clotilda and the Story of the Last Africans Brought to America* [Revojo pri Afriko en Alabamo: La sklavoŝipo Clotilda kaj la rakonto pri la lastaj afrikanoj venigitaj al Ameriko] kaj kelkaj aliaj libroj. Ŝi estas Gastprofesoro ĉe la Centro por la studado de sklaveco kaj justeco, Universitato Brown, en Providenco, Usono.

El la angla lingvo tradukis Frank Lappe (Germanujo) kaj Andrej Peĉenkin (Ruslando)

“Terura rakonto pri perdo kaj malfeliĉo, sed ankaŭ pri triumfo super malfeliĉo”



© Maarten Vanden Eynde



Organizaĵo de
Unuiĝintaj Nacioj por
Edukado, Scienco kaj Kulturo

UNESKO-eldonaĵoj (ne-Esperantaj)

www.unesco.org/publishing
publishing.promotion@unesco.org



They Did Not Stop at Eboli [Oni ne finhaltis ĉe Eboli]

UNESCO and the Campaign Against Illiteracy in a Reportage by David "Chim" Seymour and Texts by Carlo Levi (1950) [Unesko kaj la Kampanjo kontraŭ analfabeteco en raporto de David "Chim" Seymour kaj Tekstoj de Carlo Levi (1950)]

Redaktita de Giovanna Hendel,
Carole Naggar kaj Karin Priem

ISBN 978-3-11-065163-8
180 paĝoj, 170 x 240 mm, kartonita, 86,95 €
Eldonejo de Unesko/De Gruyter

La analizo de la aŭd-vidaj arkivoj de Unesko por ciferecigi ilin malkovris forgesitan albumon kun tridek ok kontakt-kopi-strioj, kiujn akompanis la tekstoj de *Magnum*-fotisto David "Chim" Seymour - raporto komisiita de Unesko en 1950 pri la lukto kontraŭ analfabeteco en Suda Italio, Kalabrio-regiono.

Kelkaj fotoj de Seymour aperis en la numero de marto 1952 de *Unesko-Kuriero*, kiujn akompanis artikolo verkita de Carlo Levi, kiu akiris tutmondan famon per sia memorlibro de 1945, *Kristo finhaltis en Eboli*.



Manual for Developing Intercultural Competencies [Manlibro pri Disvolvi Interkulturajn Kompetentecojn] Story Circles [Cirkloj de Rakontoj]

ISBN 978-0-367-19997-5
116 paĝoj, 142 x 224 mm, kartonita, 50 €
Eldonejo de Unesko/Routledge

Interkulturaj kompetentecoj rilatas al la kapabloj, sintenoj kaj kondutoj, kiujn oni bezonas por plibonigi la interagojn trans diferencojn, ĉu en la socio, ĉu trans la landlimoj. Ĉi tiu libro prezentas strukturitan, tamen flekseblan, metodikon, por disvolvi interkulturajn kompetentecojn en diversaj kuntekstoj, formalaj aŭ neformalaj.

Provita ĉirkaŭ la mondo fare de Unesko, ĉi tiu metodiko montriĝis efika en gamo de diversaj kuntekstoj. Ĝi estas grava rimedo por ĉiuj, kiuj zorgas pri efika regado de la kreskanta kultura diverseco ene de niaj socioj, cele certigi inkluzivan kaj daŭripovan disvolviĝon.



Behind the Numbers: Ending school violence and bullying [Malantaŭ la Nombroj: Ĉesigi en-lernejan perforton kaj ĉikanadon]

ISBN 978-92-3-100306-6
70 paĝoj, 210 x 297 mm, broŝurita

Eldonejo de Unesko
Havebla ĉe <http://unesdoc.unesco.org>

Lernejrilata perforto en ĉiuj formoj, inkluzive de ĉikanado, estas malrespekto al la rajtoj de infanoj kaj adoleskantaj je kleriĝo, sano kaj bonstato.

Ĉi tiu raporto prezentas superrigardon al la plej ĝisdatigitaj pruvoj pri en-lerneja perforto kaj ĉikanado en 144 landoj.

La publikajo inkluzivas ankaŭ analizon de faktoroj, kiuj kontribuas al efikaj naciaj reagoj, bazitaj sur serio de kaz-studoj komisiitaj de Unesko, pri la landoj, kiuj sukcesis redukti la oftecon de en-lerneja perforto kaj ĉikanado.

*El la angla lingvo tradukis Saed Abbasi
(Irano)*


Multaj voĉoj, unu mondo

Unesko-Kuriero aperas en la ses oficialaj lingvoj de la Organizo, kaj ankaŭ portugale, Esperante, sicilie kaj koree. Legu kaj disvastigu ĝin tra la mondo.



<https://en.unesco.org/courier> • <https://fr.unesco.org/courier>

<https://es.unesco.org/courier> • <https://ru.unesco.org/courier> • <https://ar.unesco.org/courier> • <https://zh.unesco.org/courier>



Physichromie [Fizikaj koloroj], verko de venezuela pentristo kaj kineta artisto Carlos Cruz-Díez (1923-2019). Ĉi tiu diptiko, farita el akrila pentraĵo kaj metalo, estas parto de la arta kolekto de Unesko ekde 1978. La maldekstra parto de la verko estas supre, la dekstra parto estas montrata sube.